




J
BULTENO
DE LA
DE NORO-AMERIKO

VOL. III No. 5
1964



K I O M A N K A S E N L A E S P E R A N T O - M O V A D O ?

ENKONDUKO

Ek de la komenco de JEN, ĝia Bulteno havis la principon esti tute en Esperanto kaj kiel eble plej malmulte pri Esperanto. Kial, do, ni ĉi-numere prezentas tutan gazeton pri la Esperanto-movado? Ĉar JEN devas ne simple ĝui la lingvon kiam aliaj antaŭenŝovas ĝin; eĉ dum ni junas, ni pensu pri Esperanto ankaŭ kiel celo, ne nur kiel ilo. Ke tio estas la oficiala opinio de JEN montras la ĵusa rezolucio de ĝia Estraro, ke helpi al ELNA estu unu el niaj bazaj celoj kaj ke ni penu trovi unu konkretan servon, kiun ni povas faradi al ELNA.

Ĉi tiu numero de la JEN-Bulteno konformas al la spirito de tiu rezolucio. Per prezenti aron de artikoloj pri "Kio Mankas" en diversaj flankoj de la movado, ni ne penas simple mallaudi la plenagularon (vidu la artikolon pri "Kio Mankas en JEN", se vi volas pruvon!). Ni konstatis ke ekzistas nuntempe multe da bonaj ideoj pri plibonigoj al la movado kaj multe da privata diskutado. Sed aliaj gazetoj kutime ne presas kritikojn profundajn aŭ neortodoksajn pri la movado, aŭ presas tute negativajn kaj batalemajn artikolojn nur por ataki aliajn kaj defendi sin mem.

Do, dum mankas al la movado gazeto senpartia dediĉita al movadaj problemoj, ni en JEN proponas unu numeron de nia Bulteno kiel partan korekton de tiu manko. Ni bonvenigos viajn reagojn pri la enhavo.

Pri la enhavo de la artikoloj responsas nur la aŭtoroj mem ne JEN nek la redakcio nek la gastredakcio.

La enhavtabelo troviĝas sur paĝo 51.

Mi komencu per aserto ke unu el la ĉefaj MALmankoj de ELNA estas projektoj, planoj, ideoj kaj inspiroj. La abstraktaj skemoj tute ne mankas en ELNA. Ili superabundas! Ĉiu el ni havas sian propran privatan ideon kiamaniere plej efike kaj rapide venkigi Esperanton. Ĉiu el ni scias ke per kelkdek miloj da dolaroj po jaro ni povus fari sufiĉan bruon por altiri la atenton de indiferenta publiko. En ĉiu grupo troviĝas pluraj pensuloj kiuj sagace svingas la fingron kaj prononcas la seneraran vojon al sukceso. Ni ĉiuj ŝatas projekti perfektan planon; ni ĉiuj estas spertaj fantaziuloj; ni ĉiuj kapablas konstrui aerkastelojn; ni ĉiuj emas ĵongli ciferojn por pravi ke la mono sufiĉas; ni ĉiuj ĝuas ŝvebi super la nuboj en ideala atmosfero de sukceso; ni ĉiuj povas imagi al ni kiamaniere la ceteraj devus kondukti por venki. Sed la konkreto kaj la abstrakto ne estas identaj. Niaj ideoj kaj niaj faroj ne kongruas! Do, mi ne prezentas tie ĉi medikamenton ĉionkuracan, per nova plano. Mi simple konstatas kelkajn ĉefajn mankojn de ELNA, sen simpla indiko kiel facile forigi tiujn mankojn.

MANKAS AL ELNA MEMBROJ! Tio ja ne estas novaĵo. Mankas al ELNA larĝbaza financa fundamento fontanta el kelkmila membraro el kiu ĉiu alportu sian obolon por kune starigi firman financon por la komunaj taskoj kaj servoj de ELNA. ELNA ja ne volas aŭ rajtas dekreti imposton severan; ELNA nur bezonas modestan financon subtenon de multaj personoj por plenumi sian kooperativan laboron. Tiu laboro konsistas el du partoj:

a. Ebligi starigon de servoj al izoluloj kaj societoj lokaj kiujn ili ne mem povas ekonomie, individue provizi al si.

b. Reprezenti la tutan Esperanto-movadon antaŭ la ĝenerala Usona publiko.

MANKAS AL ELNA MEMBROJ! Ne nur kvante, sed ankaŭ kvalite! Tiun plendon havas ĉiu organizo volontula pionira aŭ reforma. La homo ne estas perfekta; do la organizo ne povas esti perfekta. En tio ni ĉiuj kulpas. Sekve, en ELNA mankas sufiĉaj spertaj provitaj, harditaj, emocie stabilaj, sindonemaj, toleremaj, paciencaj, finance neŝanceleblaj membroj. La ĉefaj demandoj de la ELNA-Estraro jam dekomence ĉiam estas "Kiu taŭgas por tiu posteno?" Kiu povas fari la laboron? Kiu havas la disponeblajn tempon kaj forton? Kiu estas sufiĉe ekonomie stabila por akcepti kaj elfari longdaŭran taskon? Kiu akceptos la respondecon? Kiu povas iniciati la aferon kaj ĝin

finfari?

Mankas al ELNA kelkmiloj da membroj el kiuj ĝi povu ĉerpi kvindekon da funkciuloj kiuj ne jam estas trojungitaj al la loka movaĉo por servi je tutnacia nivelo kiel funkciuloj, estraranoj, komitatanoj, konsilistoj kaj diversfakaj specialistoj en la internaj taskoj de ELNA. El tiu kvindeko mankanta, mankas ankaŭ deko da lertul-laboruloj kiuj povas dediĉi minimume po 25 horojn ĉiusemajne dum la tuta jaro al tiaj taskoj necesaj por la baza mastrumado ĉiutaga de nia Ligo. Al ELNA mankas Prezidanto, Estrarestro, Sekretario, Kasisto kaj Redaktoro kiuj povas dediĉi almenaŭ po 30 horojn ĉiusemajne al siaj speciale gravaj taskoj. Tiuj kvin postenoj estas plej gravaj, kaj en la pasinteco ĉiuj postenuloj laboregis senspire por almenaŭ prizorgi la plej minimumon necesan. Aliaj gravaj postenoj kuŝas en pluraj konstantaj komitatoj, kiuj ankaŭ bezonas postenulojn kun konsiderinda libera tempo disponebla ĉiusemajne.

Malfeliĉe nuntempe troviĝas en la estraro mem membroj kiuj apenaŭ havas tempon sufiĉan por tralegi siajn interoficejajn komunikojn, kaj kiuj malofte partoprenas en la internaj diskutoj, opiniesprimoj kaj voĉdonoj, por diri nenion pri starigo de politiko longvida. Ĉiam denove prezentas sin la demandoj: "Kie ni trovu laborulojn spertajn, zorgemajn, volontajn? Kiu transprenu la taskon de F-ino X kiu edziniĝis? Kiu akceptos la respondecon de S-ino Y, kiu patriniĝis? Kiu volonte plenumos la taskojn de S-ro Z, kiu akceptis aliloke tempkonsumantan pangajnan plirespondecan postenon kaj ne plu disponas pri libera tempo? Kiu povas fari la bonkomencitan taskon de Studento S, kiu junulo okupos sin pri studoj por doktoriĝo kaj ne plu povas servi la Ligon longhore? Ĉiam la Kandidatiga Komitato serĉas kompetentajn volontulojn kaj demandas al si: "Kiu akceptu kandidatecon por postenoj A, B, C, kaj Ĉ, kiuj vakos ĉar ofidmaŭroj finigas kaj la Pacaj Batalantoj kiuj plenumis la oficaĵn deĵorojn nun grade fariĝas Lacaj Batalantoj, kaj ne volas plu barakti kontraŭ malhelpoj sen taŭgaj iloj, sen sufiĉaj rimedoj, laŭ fuŝa diletanta maniero, kaj rikolti nur kritikon? Sub tiaj cirkonstancoj ELNA devas esti fleksebla en sia strukturo kaj funkciomano. Unu volontulo ensaltas breĉon lasitan vaka per portempa neeblo de alia pluagi. Do la divido de taskoj ne estas facile perceptebla lau rektaj linioj aŭ klaraj difinoj!

MANKAS AL ELNA KOMUNIKILO por kunligi la membraron kaj estraron kaj ĉiujn komitatanojn per daŭra kontakto aktuala. Nia Revuo dum diversaj stadioj provis servi kiel tia interligilo, sed ties da-monata apero nur provizis ofte la faktojn post kiam jam okazis findecido. Mankis ofte ĝustatempaj informoj. Kiam nia redaktoro translokiĝis al

6

Australio okazis eĉ pli granda temp-interspaco inter redaktado kaj fina livero al membroj. Do la provo komuniki gravaĵojn fiaskis kaj la paĝoj pleniĝis per beletristiko, poemoj kaj ĉio nekoncernanta nian organizon. Do mankis eĉ en tri sinsekvaj jaroj ĝustatempaj aŭ entute gravaj informoj pri okazontaj ELNA-kongresoj. Do, krom nia Revuo, ELNA bezonas oficialan ELNA-Bultenon ĉiumonatan por ebligi aktualan koncizan komunikon per malmultaj paĝoj en malkara formato kaj presmaniero por informi, stimuli kaj kuraĝigi la Estraron, funkciulojn, kaj lokajn societojn, por ke ĉiu havu informojn necesajn por demokrateca movado.

MANKAS AL ELNA HISTORIA PERSPEKTIVO: Permesu ke mi konfesu epizodon malfelican el la prahistorio de ELNA, pri kiu malmultaj gesamideanoj ankoraŭ memoras, kaj pri kiu eĉ pli multaj neniam aŭdis. S-anoj Scherer kaj Parrish povas atesti kaj konfirmi tiun ĉi rakonton. Do, jen mia konfeso! En miaj junaj jaroj dum la jaroj 1930 kaj 1933 mi estis Kasisto de EANA. Kiel daŭra kunlaboranto en la Centra Oficejo en Fort Lee, N.J., mi vigle kunhelpis en la interna mastrumado de EANA, kaj partoprenis en grandioza eldona entrepreno. Tiam EANA eldonis belan revuon sur luksa papero, similan al nia nuna ELNA-Revuo. Ni eldonadis serion de libroj kaj jarlibron. Tie ni revis kaj planis; entuziasmis kaj malpacienkis; redaktis kaj legis presprovaĵojn; riskis kaj klopodegis. La estraro sin ne multe koncernis ĉar la Centra Oficejo ĉiam pentris brilan optimistan bildon en siaj raportoj, kaj la ĝenerala membraro des malpli zorgis pri la tendenco al troa optimismo. La konsekvenco estis ke EANA trovis sin en tre serioza financa embaraso. Sed miaj junecaj naiveco, entuziasmo, fidemo, esperemo kaj malpacienco kasista ne povis forvizi la grandajn ŝuldojn; la presistaj fakturoj ne forvelkis! La financa stato de EANA farigis eĉ pli katastrofa post finiĝo de mia kasista oficdaŭro.

Fine, sub zorga, peniga, doloriga laboro multjara flanke de nova sekretario, Joseph Leahy, kaj la nova prezidanto Joseph Scherer, oni forlasis la ambiciajn ideojn kaj limigis la eldonan programon al la plejebla minimumo. De 1935 ĝis 1942 ni devis esti kontentaj je Amerika Esperantisto en tre modesta vesto, malkare foto-obligita, anstataŭ en glata luksa verda kovrilo, bele presita sur bona papero. Fine, per ŝparema ekonomio, post superhomaĵ klopodoj, S-anoj Leahy kaj Scherer vartadis, flegadis kaj sinoferis por EANA ĝis kiam ĉiuj ŝuldoj estis pagitaj kaj EANA staris denove sensŭlda post sep jaroj de tia barakto. Intertempe multaj personoj devis lerni kaj ekzerci paciencon! Ankaŭ mi! Kaj kiel naiva kunkulpinto, mi ne facile forgesis la lecionon. Do, mi ripetu, al ELNA mankas Historia

Perspektivo. Iel nia Ligo devus profiti el prahistoriaj spertoj kaj el pasintaj eksperimentoj.

MANKAS AL ELNA PACIENCO! Dum mia prezidanteco de ELNA de 1957 ĝis 1960 mi plene okupis la tasko iom sistemigi la internan laboron de niaj postenuloj kaj komitatoj. Mi forte strebis trovi taŭgajn laborantojn por ĉiuj komitatoj kaj ne nur honoravidantojn. Pli efika interna sistemo rezultis, kaj la ĉiutagaj taskoj estis pli zorge kaj efike plenumitaj. Per mia multobligilo interkomunikado okazis regule por informadi kaj glatigi la kunlaboron, kaj ni spertis modestan mezuron de ordo anstataŭ ĝenerala ĥaoso. Ni ankaŭ forte strebis al reunuiĝo kun EANA, sed vane. Ni travivis plurajn internajn krizojn sen tro granda skuo.

Sed ĉe la fino de mia prezidanteco, regis ĝenerala malkontento pro manko de spektaklaj kresko kaj progreso. Oni interkonsiliĝis kaj la konkludo estis ke ni ne havas PLANON! Ni ne uzas la modernan teknikon! Nia revuo estas tro fuŝaspekta. Ni devas imponi la publikon per bela presaĵo, per impresa fasado. Ni devas plibonigi nian 'bildon' en la okulo de la publiko; doni impreson de kuranta SUKCESO! Oni malpacienkis. Oni provis starigi falsan fasadon en formo de mez-luksa ĉiumonata 24-paĝa Revuo, kiu estis multe tro kara por la financoj de nia malgranda anaro. Ni provis dorloti niaj membrojn per beletristika revuo. La eldonkostoj de la revuo suprensaltis kaj la pluvivo ne estis certa.

Ni apelaciis al nia malgranda cirklo de fideluloj, petante ke ili fosu profunden en la poson. Deko el ni elfosis po \$50 dum la Kongreso en Chicago por garantii la pluvivon de nia Revuo. Multaj el ni jam estis elfosintaj el propraj poŝoj centojn da dolaroj en pluraj antaŭaj jaroj por afranko, oficejaj kostoj, ktp. Sed la pluvivo de la Revuo en sia nuna grandeco estas nepraĵo! Do donacu plu! La malpacienco ciam plifortigis, kaj okazis artefaritaj financaj krizoj pro misproportciaj elspezoj por nia Revuo.

"La movado stagnas! Ni devas fari unu lastan plejstreĉan klopodegon per superforto venki la inerton kaj indiferenton ce la publiko. Se ni povas nur streĉi niajn fortojn ankoraŭ iom pli ni certe sukcesos morgaŭ! Ankoraŭ unu puŝo! Ankoraŭ cent dolarojn! Ankoraŭ unu jaron da noktmeza oleo! Sukceso ne estas haltigebla! Ĝin oni povos ne plu prokrasti!" - Tiuj ĉi vortoj ne estas novaj al niaj estraranoj kaj malnovaj membroj. **MANKAS AL ELNA LA PACIENCO!**

Kiam mi estis Estrarestro de 1960 ĝis 1963 mi provis instigi paciencon, singardemon. Mi helpis enoficigi diligentan kompetentan

konsciencan kasiston. Mi celis al plene evoluigita budĝeto, aktiva Financa Komitato. Mi daŭre insistis ke ELNA havas aliajn gravajn servojn krom la Revuo por liveri al siaj membroj kaj lokaj societoj, ke mono estu disponebla ankaŭ por la ceteraj programeroj. Sed al ELNA mankis la Pacienco kaj rezulte la budĝeto estis renversita kaj la rekomendoj de la Financa Komitato estis flankensovitaj.

En majo 1963, kiam mi kandidatigis por reelektado al prezidanteco, responde al KANDIDATA DEMANDARO dissendita de JEN, mi respondis mallonge ke ELNA ne bezonas planojn kaj projektojn detalajn, nek aerkastelojn brilajn; ke ni devas fronti la realon kaj mem plenumi en nia propra forto laŭ nia modesta skalo, anstataŭ cerbumi pri falsa fasado. Mia respondo aperis apud respondoj de ceteraj kandidatoj kiuj pentris allogajn optimismajn bildojn pri siaj intencoj se oni ilin elektos. La kontrasto estis trafa. Rezulte JEN konsideris min proklamanto de "Malvenkismo", kvazau mi estus muskokovrita ŝtono kusanta en stagnanta akvo; homo sen vizio; perditio en ĥaoso. Rezulte JEN rekomendis al siaj membroj kaj legantoj elekti la kandidaton kiu plej brile promesis tujan sukceson. Sekve plue mankas al ELNA la PACIENCO. Ni devas kontenti per tiuj atingoj kiujn ni povas akiri per niaj propraj fortoj limigitaj, sur solida modesta bazo konforme al la nuna nombro de kotizpagantaj membroj sen plurfojaj alvokoj por grandaj monoferoj por fronti artefaritajn "krikojn" de la Revuo. Ni ne povas alpreni la metodojn kaj ilaron de Madison-Avenuo; ni ne povas la publikon per falsa fasado. Blufado ne utilas. Nur modesta daŭra senspektakla laboro povas konstrui ion daŭran, firman, utilan, kiu pluvivos la formorto de la eĥoj de reklamistaj fanfaroj.

"La Celo pravigas la Ilojn!" estas aforismo kara al la komunistoj. Sed ankaŭ Usonanoj havas similan kredon. Se nur niaj idealoj, celoj, kaj intencoj estas bonaj kaj noblaj, ne gravas seni ilin atingas per kurba, nereкта, malhonesto ĉirkaŭvojo! Ne gravas se ni diras etan mensogeton blankan, se ni nur povas imponi la publikon! Ne gravas se malantaŭ falsa fasado troviĝas nenio solida aŭ utila; la ŝajno estas la gravaĵo; la impresio estas la ĉefaĵo!

Mi longe rifuzis riverenci antaŭ ŝiboletado kaj mi ankoraŭ rifuzas. Laŭ miaj observoj, ju plu oni uzas malindajn metodojn kaj ilaron por atingi alte deziratan celon, des pli malfacila estas atingi de bona rezulto. Se oni uzas maltaŭgajn laborilojn oni detruas fakte la finrezulton de nia laboro. Oni ne

uzas marteleĝon por ripari delikatan horlogon; oni ne perfortas por atingi interkonsenton; oni ne uzas atombombon por allogi la pacon! Maltaŭgaj iloj au metodoj tiel forte aliigas la finrezulton ke oni ne plu povas rekoni la altan celon tiel longe sopiratan. La nobla celo ne pravigas malindajn perilojn! Kiam malpacienco regas, tiam oni sentas fortan tenton apliki malindajn ilojn.

Do, kara JENanaro, bonvolu konsideri tion ĉi kvazaŭ Testamenton de pasanta generacio al venanta generacio. Memoru ke unu el la plej grandaj mankoj de ELNA estas la PACIENCO. La Espero, la Obstino, kaj la PACIENCO, "jen estas la signoj per kies potenco, ni paŝo post paŝo post longa laboro, atingos la celon en gloro."

Mi deziras al vi PACIENCON!

N I A K O N F E R E N C O E N C A M B R I D G E

DE HARVARD, KUN AMO

Allan Fineberg

Eble plitaŭgus, tamen, la titolo, "Al Harvard, Kun Amo," ĉar la afero estis tiel bona kaj laŭdinda. Afero? Bona kaj laŭdinda? O, jes, ja, eble vi jam ne scias pri l'okazintaĵo tutesperanta ĉe Cambridge, Mass., kie troviĝas Universitato Harvard, kaj la tiea Esperanto-Klubo de Harvard-Radcliffe, filio de JEN. Kiam, do? Nu, en Aprilo, kiam ne tro pluvis, kaj la suno ofte sian vizagon al la mondo montris.

Imagu, do, renkontiĝon de junaj (kaj kelkaj ne-tre-junaj) geesperantistoj kaj estontaj gesamideanoj, kiuj dise kaj kune veturis per automobilo kaj autobusetoj kaj aviadilo por atingi la Unuan Interkolegian Esperanto-Konferencon, kies patrono kaj organizinto estis la Klubo de Harvard. Venis el Vaŝingtono, Nov-Jorko, Baltimoro kaj diversaj aliaj urboj preskaŭ kvardek personoj, el kiuj ĉiu faris sian propran kontribuon al la generala spirito de la kunveno.

La nov-jorka grupo alvenis malfrue la nokton de vendredo. Kun plezuro ni rapide plenumis la "oficialajn" aligilojn, kun bedaŭro pagis la aligkotizon kaj kun laceco trovis ĉiu la propran liton, enliĝigante nur por vivigi songojn pri la morgaŭaj kaj dimanĉaj dibocoj... kaj seriozaĵoj!

... Frumorgaŭis. Ekaudigis en la granda domo etaj voĉoj, ĝemoj, kaj iuj konataj ronkobruegaĵoj. En la matena varmece la necesejo

estas stranga senserura ĉambreto. Papera naztuko sur la pordo, tamen, espereble atestos per sia silenta pureco pri l'uzateco de la ejo.

Reendormiĝo gis pli "civiliza" horo, kaj tiam senprokrasta forirprepariĝo. Matenmanĝo aliloke. Tagmanĝo malaliloke. Ĉiam bonaj, kaj faritaj per la manoj de bonkoraj esperantistinaĵoj matenkaj tagmanĝo-faristoj. Pasis do multmanĝaĵe la tago. Sed la nokto, nu la nokto (ĉu noktego, aŭ noktoĉjo, au noktonjo?) estis Io Alia, kiel diras en Harlem la negraj muslimanoj (aŭ eble Io Ala?)....

Tvistacado prezentita de lertetaĵoj junaj korpoj plenigitaj per "hejm-bakita" punĉo estis de l'inteligentularo mokata, kaj la laste menciita grupo forlasis la arenon de la dancado por kanti, kantigi, kaj aŭskulti. Komenciĝas tio ĉiam per la tradiciaj esperanto-himnaĉoj, la bonegaj ĝim-meĵaj tradukaĵoj, kaj similaj. Sed vokas mallaŭte la ankora voĉeto, la eta revolucia refleksmuskolo, petante, pledante por kantoj laborklasaj kaj radikalaj. Nemultajn goldvateranojn ni havis inter ni.

En nokto malfruege, oni sukcesis forskrapide la tegmento kaj forbalai de la planko la lastajn trofestintojn. Regis tiam absoluta ebria dormsilento, kiun benis la pluvoza nokto.

Dimance, en moderna biblioteka ĉambro, malkaŝiĝis la perlo de la konferenco: la konata kaj geniega tradukisto de diverslingva poezio Esperanton, lic. Julius Balbin!, faris elstaran prelegon pri la nova ondo de germana poezio, kiun li komparis je la antaŭmilita poezio de Germanio. Li legis la tradukaĵojn de kelkaj, kaj ankaŭ la originalaĵojn foje. Bonege. Belege. Bis kaj bis!

Neeblas menci i nomojn, ĉar kruele estus forgesi iun ajn. Baldaŭ ĉiuj interkonatiĝis, kaj tro baldaŭ ni disiris. Sed jen! survoje per feliĉa hazardo tri veturiloj en la nokto unu la alian trovis, kaj antaŭ ol fine disigi la hejmenrevenantoj havis oportunon por babilo, kaj ree adiaŭi. Tie, en varma ejo apud la granda ŝoseo, rerenkontiĝis la konferencanoj en la nokto.

- Sed la konferencon! Ĉu vi tute ĝin forgesis?

- Nu, tiu estis la malpli grava ero de l'afero!!

KELKAJN TAGOJN POST LA KONFERENCO atingis nin, iom malfrue ĉar marposte, la jena poŝtkarto:

"Multe da prospero al la renkontiĝo kaj grandan feliĉon al ĉiu partoprenanto deziras al vi: Carlo Minnaja, Gen.Sek. de TEJO."

anonce

anonco

Anonco

ANONCO

A N O N C O

A N O N C O !

A N N O O N N C C C O O O
A A N N N O O N N C O O o
AAAAA N N N O O N N C O O o
A A N N O O N N C C C O O O

JEN havas novan Sekretarion. Antaŭ preskaŭ unu jaro, Richard Kollin, la tiama Sekretario de JEN, sciigis al la Estraro ke li intencas resti en tiu posteno ne pli longe ol ĝis junio, 1964. Ĉar li tiom antaŭvideme kaj prudente donis al ni tiun grandan antaŭ-averton, ni povis dediĉi multe da tempo al serĉado kaj pensado pri kiu plej bone anstataŭus lin kiel Sekretario. Finfine, pli ol unu monaton antaŭ la datlimo, la Estraro trovis volontan kaj tre kompetentan novan Sekretarion: A N N . B . O D I N E, studento pri la antropologio ĉe la Universitato Cornell, en Ithaca, New York. Ann loĝas en Portoriko, kaj ŝi akiris sperton pri Esperanto-organizado kaj tie kaj ĉe ŝia universitato. Ŝi jam uzis Esperanton en siaj vojaĝoj al Japanujo, Bulgarujo, ktp. Ĉi-jare ŝi estas kandidato kaj por Estrarano de JEN kaj por Estrarano de ELNA. Do, ek de nun, skribu al JEN per ŝi, kaj vi ricevos respondon de ŝi aŭ unu el ŝiaj helpantoj (listigitaj sur la interno de la antaŭa kovrilo de ĉi tiu gazeto). Ŝia adreso estas:

Ann Bodine
331 Sage Hall
Cornell University
Ithaca, New York 14850.

Kompreneble ni esprimas la sentojn de la tuta membraro de JEN, donante ĉi tie niajn plej korfundajn dankojn al Dick Kollin pro liaj servoj al JEN de ĝia fondigo ĝis nun. Li ne nur preskaŭ unusole fondis la organizon, sed li skribis multcentojn da leteroj instigaj, konsilaj, negocaj, baraktaj, ktp., multobligis la JEN-Bultenon kaj dissendis ĝin, kaj ĝenerale elspezis nekalkuleblajn milojn da horoj por pligrandigi la membraron kaj abonantaron de la komenca unu ĝis la nuna centkvindeko. Kiam oni konsideras ke Dick ankaŭ laboras kiel bibliotekisto 40 horojn semajne kaj estas diplomita studento dum la noktoj, oni devas miregi pri la laboro kiun li faris kiel Sekretario.

"EK AL!"

Tiu sono nun aŭdata super la lando (ĉefe marborde) estas, sen iu dubo, la nova kaj bonvena voĉo de JEN. Novaj ideoj kaj energio eksplodas ĉie ajn.

Ekkomenciĝas tutnacia korespondkurso; ekkreiĝas kompleto por hejma lernado; ekruliĝas granda varbsukceso. Novaj gazetoj floras, nova libroservo stariĝas. K.t.ek.

Elstaranta inter la multaj kontribuaĵoj de JEN estas la emfazo je Esperanto kiel ilo, ne temo; kaj la vasta uzado de la lingvo por ĉiuj specoj da aferoj.

Kial kritiki? JEN petas progresraporton el la vidpunkto de eksteruloj. Tia kritiko ne valoras, se ĝi kontrastas JEN kontraŭ aliaj organizaĵoj. Ĝi traktas nur pri JEN kontraŭ la ebleco de pli forta JEN, per pensoj pri la sekvantaj kampoj:


Regionismo. Antaŭ ne longe, mi demandis al juna Esperantista amiko, universitata studento, ĉu li scias pri JEN. Li diris, "Ho, jes. Tio estas la klubo por la orient-marborduloj, ĉu ne?" Por nacia organizaĵo, la estroj de JEN devu atenti al eble senkonscia regionismo. Ekzemple, ne parolu pri la libroservo kiel "konvene lokita por ĉiuj" en Novjorko; evitu privatajn ŝercojn konatajn nur de loka grupo, ktp.

La Gazeto. Ĝi enmetas novan vivon en la lingvon. Sed la lastaj numeroj ne spegulas la veran JEN--espereble. La presaĵo estas aĉa, la enhavoj malmultaj. Enestas kelkaj gemoj--sed estas preskaŭ maleble legi ilin. Kaj--post kelkaj kritikoj de aliaj Esperanto-eldonaĵoj, ĉu estas fikcio de la imago, aŭ ĉu ĝi malregule aperas?

Ŝajnas ke kelkaj regionaj bultenoj redaktataj de JEN-uloj estas pli allogaj, pli bonaspektaj. La nacia organo havu la plej bonajn enhavojn de la Usonaj JENuloj, kaj ankaŭ la plej bonan aspekton.

Komunikado. Sistema disvastigo de informo al ĉiuj membroj, ĉie, estas la vivsango de efika organizaĵo. Ne estas facile. JEN ŝajne ne tiun problemon solvis tiel bone kiel ĝi opinias.

De JEN ĉi tiu oldulino ricevis kelkajn apartajn leterojn dum la pasinta jaro, kiuj petas abonon al Kontakto--kvankam ŝi jam estas abonanto. Ŝi tamen neniam priaŭdis aŭ ricevis, ĝis antaŭ kelkaj semajnoj, la bonegan broŝuron, "a word about esperanto". La leteroj kaj la broŝuro mem ne gravas. La punkto: se iu en kelkaj poŝtlistoj ne aŭdas pri novaj aferoj, ĉu ĉiu JEN-membro sisteme ricevas
(daŭrigo sur p.14)



Di Gio estas Armand Su

(daŭrigo de p.12)

novaĵojn? Ĉu ĉiu izolita JEN-membro, ĉe mez-okcidenta universitato, ekzemple, vere scias pri deciditaj planoj kaj agadoj? Aŭ ĉu la estroj nur kredas tion?

Planado por post-universitataj jaroj. La JEN-uloj kaj la tuta Movado nun centriĝas ĉirkaŭ la universitatoj. Ŝajnas al la JEN-uloj, ke la oldularo estas pli hezitema kaj pensema pri bonaj ideoj de JEN, ol estas JEN mem. Tio, kion skeptikeme rigardas la oldularo, estas la vasta venonta malpleneco inter la universitata aĝo kaj la 30-oj. Olduloj povas antaŭvidi tagon, kiam JEN-uloj estos aliloke, post la universitato, kaj la duonfinitaj projektoj devos daŭri, la publikigo kaj uzado de Esperanto ankoraŭ estos necesaj, kaj la fakturoj ankoraŭ bezonos pagon. Estas nur duonvero, ke oni ne povas "mallerni" lingvon. Precipe tian, kia Esperanto, kie oni devas mem entreprenemi por ekzerci ĝin. Kun la plej bonaj intencoj, la jaroj kiam oni komencas vivlaboron, familion, ktp., ne lasas multe da mono aŭ tempo (por ne paroli pri intereso) por aliaj aferoj.

Tiuj jaroj estas la faligaĵo de ĉiu organizaĵo, kaj dum ĉiu generacio ili haltigas la regulan progreson de Esperanto. Nun JEN, per difino de aĝlimoj, penas preni respondecon pri tiuj jaroj. Ni esperas, ke vi solvos tiun problemon.

JEN kaj ELNA. Ŝatata estas la vigla kaj aktiva rolo ekprenita de JEN dum la pasinta jaro pri la ELNA-elekto, kulmininta je la elekto de junulara membro de la Estraro. Tio certigas daŭran intereson de JEN pri la landa asocio. Pli ŝatataj estas ĝiaj ĉi-jaraj metodoj, kiuj spegulas iomete pli da diplomateco.

Estu je la eterna kredito de JEN-uloj, kiuj alvenis jam pli ol duonvoje, ke ek de la unuaj tagoj de la organizaĵo ili komencis dialogon kun la olduloj (ne ĉiam pri mono) trans la jarogamo.

Eble iun tagon, komprenebla komunikado okazos trans la landlimo inter Junulujo kaj Oldulujo. Ne pri Esperanto (hororoj!), sed per Esperanto.

Kaj la oldularo eklernos paroli ĝin.

Nota de la Redakcio pri la ĉi-supra artikolo:

Por iom pli komprenebligi la aluditajn punktojn en la artikolo de f-ino Barkley (kaj ŝi ja tute pravas dirante ke nia komunikado ne estas tute senriproca!) necesas aldoni ke fakte estis la centra organizo de TEJO kaj ne JEN mem, kiu sendis al ŝi leterojn pri Kontakto. TEJO lastatempe organizis grandan varbkampanjon en pluraj landoj - en kiu fakte kunlaboras JEN (vidu la informojn sur alia paĝo de ĉi tiu numero) - kaj Usono inkluzivigas en tiu kampanjo.

Neniu disputas ke Esperanto estas vivanta lingvo. Por ĝin lerni oni devas tamen esti optimisto, sin persvadi ke ĝi havas pli certan estontecon ol ekzemple la kimra, postvivanta ĉiam pli malforte inter gemaljunuloj en la montaroj de okcidenta Britio, kies angla lingvo jam ĉien penetris kiel administra lingvo.....

Ĉu Esperanto kun sia precipe papera kulturo kaj proksimume la sama nombro de uzantoj havas pli bonan ŝancon? En aŭgusto 1963 brita televidisto diris, ke ĝi estas parolata de proksimume unu miliono; sed Mario Pei, bone konata filologo, pritaksas en "Unesco Courrier", novembro 63, la nombron de esperantistoj je 8 milionoj. Kion oni prenas kiel bazon? Kiel difini esperantiston? Laŭ Zamenhof (Bulonja Deklaracio, 1905) "Ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon." Ĉu inkluzivi la vastan armeon de veteranoj nun ripozantaj hejme sen plu ĝin uzi? Ĉu komencanton de unu semajno? Ĉu kursfininton, kiu perdis intereson kaj deklaris ke li forlasis la movadon? Se por bono de nia moralo ni ĉiujn ĉi kategoriojn inkluzivas, enketas en limigita regiono..... ĝis tuta elĉerpiĝo de ĉiu fonto, kaj faras kalkulon en proporcio, ni konkludas, ke la maksimumega cifero por la tuta mondo estas nur rondcifere 500.000. Kaj plue, konstatinte kun terura elreviĝo, ke malpli ol la triono respondis en Esperanto al simpla demando, ni konkludas, ke la nombro de eĉ malbonaj parolantoj estas ne plu ol 160.000. Sed en Afriko kaj Azio, pro malrapida informado, manko de instruistoj kaj analfabeteco, ankaŭ en Usono pro supereco de la angla, la proporcio inter granda loĝantaro estas multege malpli ol ekzemple en orienta Kent (provinco de Britio). Se ni, pro tio, rajtas dividi per tri, restas en la mondo nur rondcifere 50.000 esperant-parolantoj, anstataŭ la ok milionoj de Mario Pei.....

Jen do unu faceto de nia misinforma propagandado. Ni finas trompante ankaŭ nin mem kaj vivas en falsa paradizo, samkiel ni faras dirante, ke la lingvo estas uzata en ĉiuj situacioj de normala vivo. Se ĉiuj esperantistaj butikistoj venos labori sur la sama strato, tiam oni povas butikumi en Esperanto, t.e. sen antaŭe esti lerninta la tiean nacian lingvon..... Pli realisme estas certe, ke, sen sociaj bazoj kiaj ekzistas por naciaj lingvoj, Esperanto absolute ne povas allogi nek reteni la intereson eĉ de tuta generacio de infanoj devige instruitaj en la lingvo en la lernejoj; do restos en la movado kelkaj idealistoj, kelkaj diletantoj.....

Escepte de ĝiaj arkitekturo, miziko, skulptado kaj pentrado ĉiu kulturo estas firme enradikiĝinta en la lingvo, tiel ke iusence la lingvo trenas la kulturon kaj ne inverse, kvankam beletristiko (estante kvazaŭ lingva artformo) fariĝis ankaŭ siavice respegulaĵo de popola kulturo..... Esperantista vivo estas nur societa, kvankam la potencialon ĝi ja havas..... Ĝis nun Esperanto estas nur tre plezuriga tempopasigilo por unu vespero de la semajno. Jen la kerno de la nova realismo en la movado, klarigo de tio ke oni ne aliĝas facile al ĝi, sed facile ĝin forlasas. Lingvo senlanda ne havas lokon en la moderna mondo. Ni kreu la landon, kies civitanoj, eble estinte senŝtatuloj sen espero aŭ fuĝintoj for de la premo de netolerebla suferado, fariĝos elito de la movado kaj de la mondo..... Por ili ekzilo fariĝu azilo, sed pozitiva, montranta la vojon kiun plejparto el modernaj esperantistoj ne sekvos..... Kie estas sufero, estas ankaŭ espero; sed unue necesas ofero.....

Reaperigita el Sennaciulo

Aperis

La Somera Numero

de

K O N T A K T O

Internacia junulara revuo, riĉe ilustrita, legata tutmonde

L a e n h a v o i n k l u z i v a s

"Junulo kaj Idealo" - Taekeng Kim (Koreo)

"Ĉu Sesa Senso?", raporto el Sovetanio, Usono kaj Britujo

"Knabo kun Pakaĵo" - Jozsef Kopre (Hungario)

"Tipa Sveda Festo" - Kerstin Sällvin (Svedujo)

"Amsterdam" - Hans Bakker (Nederlando)

"Internaciaj Aspektoj de la Manskribo" - Jan Schaap (Nederlando)

Abonu tuj - ek de ĉi tiu somera numero!!

Jarabono: \$2.20

(notu ke se oni estas individua junula membro de UEA oni ricevas T.E.J.O, Niuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando / Kontakto)

Laŭ mi ekzistas tri ĉefaj punktoj:

1. Mankas instruistoj kiuj flue parolas la lingvon. Certe la instruado de Esperanto suferas ĝenerale pro instruado de fuŝparolantoj. Ofte ili ne havas la klarecon ekspluati la simplecon de la gramatiko, ekzemple en elementaj lernejoj, por montri la utilon de Esperanto en akiro de pli bona scio de la gramatiko de la nacia lingvo, kaj kiel elirpunkto en lernado de aliaj lingvoj.

2. F. lua scipovo de Esperanto ne garantias ke oni efike instruos ĝin. Interesa personec kaj instru-kapablo necesas. Mi povas atesti ke kapablo povas veni per sperto.

3. Uzo de malmultekosta, eĉ ne adekvata, lernolibro, kiel The Esperanto Teacher, donas la impreson ke Esperanto estas nur simpla, malkompleta kodo anstataŭ bela, preciza, kompleta lingvo. Mi rekomendas Step by Step in Esperanto, de Butler, kaj Teach Yourself Esperanto, de Cresswell kaj Hartley, en tiu ordo.

Por pluraj komentoj pri la pr blemo mi rekomendas la punktojn faritajn de Donald Broadribb en la ELNA-Revuo, februaro 1964: "Nia Lingvo Facila". Li certe klarigas la problemon se ne la solvon.

Problems of Development estas la temo de anglalingva Internacia Kurso okazigota de la Studenta Unio de la universitato de Lund, en Svedujo, ĉi-somere. La Esperantistoj de Lund sendis al la redakcio detalojn pri la kurso, en la espero ke multaj geesperantistoj partoprenos. La precizaj detaloj de la kurso estas: 23 aŭgusto ĝis 6 septembro. La kurso pritraktos ĉefe la problemojn kiuj kuŝas malantaŭ la nuntempa rapida evoluo de la mondo - problemojn ekonomiajn, sociajn, ktp. Por pliaj detaloj skribu al nia redakcio.

Por instruistoj kaj kursestroj ni aparte rekomendas la liston de lernolibroj, legolibroj kaj aliaj helpiloj, kiu aperis en la junia numero de la Revuo Esperanto. Samtempe kun la listo, oni aperigis la informon ke la dua Konferenco de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata okazos en Britujo dum aŭgusto 1965. La unua tia konferenco okazis, kompreneble, dum la pasinta julio en Beograd, Jugoslavio. Pri ĉi tiu unua konferenco aperis speciala dokumento de UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado).

Post kelkaj jaroj da laborego en la Movado, plejparte inter la junularo, mi sentas kiel aliaj, ke la ĝeneralaj sukcesoj, la fruktoj de la ĉiutaga movada laboro estas mapli ol oni ordinare atendus. Certe ne ekzistas ia absoluta mezurilo per kiu mi povas rekte scii, absolute, ĉu mi sukcesas aŭ ne sukcesas rilate al la kvanto da enspezita laboro kaj la proporcio de rezultoj.

Dum jar j mi agis en kelkaj aliaj movadoj, kaj politikaj kaj porpacaj, rasegaligaj, ktp. Mi fakte laboris en kelkaj ne tro popularaj movadoj kaj pro tiu agado, eĉ sen mezurilo, mi povas juĝi iel ĉu mia enspezita movada laboro pli malpli kaŭzas sufiĉe da rezultoj laŭproporcie. Mia respondo devas esti klara "ne". La kvanto da laboro por atingi nur mez sukcesajn rezultojn en la Esperanta movado (almenaŭ ĉi tie en Usono) estas multege pli ol tiu de iu ajn alia movado en kiun mi iam ajn involviĝis.

Kial tiu ĉi fenomeno ekzistas? Mi tute ne scias. Ŝajnas al mi, ke vere estas grandega lingva problemo en la mondo kaj estas memevidente ke Esperanto ofertas se ne la plej bonan solvon, almenaŭ unu el la plej bonaj solvoj de tiu ĉi problemo. Esperanto estas proponita kiel solvo de la lingva ĥaoso de la mondo, sed la mondo ne akceptis ĝin ĝis nun. Kial?

La respondo al tiu demando kuŝas en unu el du lokoj: aŭ la problemo kuŝas en la Esperanta movado mem, aŭ ĝi kuŝas ĉe la popoloj... en la socio. Se la respondo kuŝas ĉe la popoloj, mi tuj povas skizi almenaŭ kvin respondojn (kaj certe estas multe pli):

1. Eble la angla lingvo jam funkcias kiel internacia lingvo kaj pro tio multaj homoj ne interesiĝas pri Esperanto.
2. Eble Esperanto mem ne estas tiel facila kaj alloga kiel ni kredis (multaj esperantistoj ofte embarasiĝas eksplikante la "mal"-vortojn al iu intereso).
3. Eble la homoj ne estas pretaj akcepti ideon tiel radikalan kiel Internacia Lingvo.
4. Eble la lingvo ne estas tiel efika kiel aliaj lingvaj projektoj kiel Interlingua.
5. Eble la ideo de internacia lingvo ne povas sukcese batali kontraŭ nuntempa naciismo en la mondo.

Mi estas certa, ke vi povas aldoni aliajn kvin respondojn al tiu listo, ĉu ne?

Do, jen mia teorio pri la afero: La monddisvastiĝo de la angla lingvo, la facileco aŭ malfacileco de Esperanto, kion la popolo

sentas esti "radikala", la legebleco de Interlingua, la naciisma nivelo de la mondaj popoloj, ĉiu punkto supozeble responda al la baza demando pri la malrapida kresko de la Movado, estas tute for de la manoj de la Esperantistoj mem. Kion povas fari Esperantistoj pri la facileco de la lingvo sen detruiri la lingvon mem? Kion povas fari la Esperantistoj pri la disvastigo de la langla lingvo? Kion povas fari Esperantistoj pri la mond-nivelo de naciismo. Ĉu firmiko povas transnaĝi la Atlantikon? Ne, amikoj, tiuj ĉi argumentoj (ĉu veraj aŭ falsaj) estas tute ekster nia influo. Eĉ se unu el la kvin respondoj pravos (kaj mi tion dubas), ĉu vi povas ion ajn fari pri ĝi? Tute ne! Ne malŝparu vian tempon batalante ventmuelilojn nevenkeblajn, precipe se ili eble ne ekzistas.

Mi kredas, ke la solvo de la demando pri malrapida kresko ne kuŝas inter la mondaj popoloj. Mi kredas ke la solvo ne estas mondskua kaj certe ne estas tiel impona aŭ ekster la manoj de Esperantistoj. Mi kredas ke la solvo kuŝas en la movado mem aŭ pli precize en la nuntempa strukturo de la movado. Mi kredas, ke UEA kaj preskaŭ ĉiuj landasocioj estas strukture organizitaj tiel stultege, tiel kontraŭ-logike, kun tiom da fuŝado kaj tiom da neorganizita kaj malŝpara laboro, ke estas bonŝance ke la Movado ankoraŭ funkcias! Se la kialoj de nekreskado estas ekstermovadaj, la kialoj ja estas ekster niaj manoj. Sed se ili estas enmovadaj, se la popola rezistado al nia ideo rezultas el manko de bona farita, vere alloga propagando; se ĝi rezultas el malefikeco de la struktura mekanismo de UEA, ni simple devas reorganizi nian movadon por multege pli efika uzado de jam ekzistantaj potencon! Se oni povas imagi la movadon kiel maŝinon, mi povas diveni ke ĝi funkcias je pli-malpli 20-procenta efikeco. La aliaj 80 procentoj estas malŝparego de energio, perdita pro la mallogika organiza strukturo de la movado (UEA).

Se UEA kaj la landasocioj ne kreskas sufiĉe (fakte, ili malkreskas rilate al la popolkvanto), se la progresaj rezultoj ne sufiĉe rilatas al la enspezata laborkvanto, estas difekto en la Movado, kaj laŭ mia opinio la plej saĝa antaŭenpuŝo estus tuta reorganizo de UEA kaj ĝiaj landasocioj laŭ multe pli logika, racia, kaj ege pli efika strukturo. Estas multe da manieroj okazigi tion. Laŭ mi, unu el la plej bonaj manieroj estas malaperigi landasociojn kaj iliajn etajn gazetaĉojn. La monata revuo de UEA, Esperanto, sufiĉus por la tuta movado se oni multe pligrandigus la sekcion "Tra la Mondo" per multe pli da paĝoj. Specialaj naciaj komitatoj povus prepari specialajn nacilingvajn propagandaĵojn unu- aŭ dufoje jare. En tiu ĉi plano, landasocioj tute malaperus, sed ne malaperus nacia agado. Lokaj grupoj estus la bazaj eroj de UEA. E tus unu kotizo por loka, nacia kaj internacia

membreco.

Sur ĉiu el la tri niveloj (internacia, nacia, kaj loka) oni trovos stabon de ses fak-specialistoj (perantoj):

1. Ĝenerala Propagando (povus esti eta komitato)
2. Registaraj kontaktoj
3. Financo (i.a. ricevas jarkotizojn)
4. Instruado kaj ekzamenado
5. Helpredaktoro de Esperanto (nacia k loka)
6. Peranto por la Libro-Servo de UEA.

Lokaj grupoj (eroj de UEA) renkontiĝos kiel antaŭe (sen ekstra kotizo). Propagandajn elspezojn faros la loka propaganda specialisto per mono kiun li ricevas de sia propra fako. Lumono por renkontejo ktp. venus de la loka financa peranto kiu ricevos ĝin de la propra fako. Oni ricevos monon por luo, propagando ktp., laŭ membrokvanto de la loka grupo. La celo de la loka grupo estas okazigi interesajn kaj allogajn kunsidojn kaj kreskigi la membrokvanton. La loka propagandperanto kaj la financperanto ne elspezos multe da mono sen permeso de la nacia fakperanto (kaj ili siavice ne elspezos multe da mono sen permeso de la fako en la Centro de UEA.

Ĉiu peranto agos horizontale je la propra nivelo, sed ankaŭ li estos kunordigita vertikale. Estos specialaj multobligitaj fakaj informiloj senditaj el la Centro de UEA al ĉiuj fakperantoj tutmonde. En tiu rilato, se nova esperantisto en Nenie, Wyoming, volas komenci propagandan kampanjon en Nenie, li almenaŭ kontaktu spertan fakperanton aŭ lokan aŭ nacian. Kun tiuj konsiloj, eble la nova esperantisto ne multobligiĝos siajn proprajn propagandaĵojn (kun teksto kaj literumo kiel tiuj de 8-jarulo)! Eble li ne venenigos la lokon por la venontaj dek jaroj per nekredeblaj stultaĵoj.

Imagu la movadon se la energio de ĉiu movademulo estus uzata logike, racie kaj ŝpare, kiel en iu alia ordinara internacia organizo, anstataŭ la nuna ĥaosa kaj malŝparega tempoperdo je la faro de tre amatoraspektaj propagandiloj, gazetaĵoj ktp. Imagu la feliĉan ordinaran membron: li pagos per unu ĉeko al landa peranto (financa) sian jarkotizon, kaj li povas ĉeesti lokajn kunvenojn, naciajn kongresojn, internaciajn kongresojn, kaj ricevi profesiaspektan, dikan monatan gazeton, Esperanto (kiu enhavas novaĵojn lokajn, naciajn kaj internaciajn). La membro povas esti peranto aŭ help-peranto en multaj agadfakoj aŭ loke aŭ nacie aŭ internacie. Se ĉiu havas sian propran faklaboron, baldaŭ kreskos ankaŭ da altnivelaj specialistoj, ĉiuj kiuj laboras al la fina celo, la mond-agnosko de Esperanto.

Tiam, kaj nur tiam, oni povas komenci gravegan, altnivelan, racian, objektivan, sciencan esploron pri la lingvo kaj pri problemoj de kresk-

ado ktp. (se ili ankoraŭ ekzistas). Nur tiam, kiam ekzistas logika organizstrukturo funkcianta multe pli efike ol nun; nur tiam, kiam tiu malhelpanto en Nenie, Wyoming, kun sia multobligilaĉo estas nur malaperanta fenomeno (ne ĉiutaga inkubo kiel hodiaŭ); nur tiam, kiam UEA glate funkcias kiel tuta organizo kun ĉiuj partoj en bona ordo, funkciantaj kiel mekanismo, celante al komuna celo; nur tiam, kiam la organizo povas teni pli da novaj membroj ol la ĉiujara perdo; nur tiam, kiam oni komprenas, ke idealismo ne postulas kultismon; nur tiam, kiam oni havas stabon da altnivelaj, neamatoraj propagandaj specialistoj kunordigitaj je la internacia nivelo; nur tiam, kiam UEA dungas altnivelajn reklamartistojn, por centrigi la artilaboron por la naciaj kaj lokaj propagandaj perantoj; nur tiam, kiam UEA dungas profesion reklamvendiston por Esperanto kaj per li kaj per multe pli da abonantoj (ĉar ne ekzistos landasocioj) UEA povas dikigi kaj kreskigi la abonkvanton; nur tiam, kiam tiuj ĉi novaj fakperantoj uzas skribpaperon desegnititan ĉi-jare anstataŭ en 1928, kaj ne presitan per vomverda inko; nur tiam, kiam la Estraro de UEA estas elektita per la tuta membraro, per enpoŝtigitaĵoj balotoj; nur tiam, kiam ĉiuj naciaj fakperantoj ricevas siajn po tenojn rekte de la internaciaj fakperantoj de UEA, kaj ĉiuj lokaj perantoj ricevas siajn postenojn de la nacia peranto; nur tiam, kiam UEA eldonas la revuon Esperanto tiel bone kaj tiel altnivele ke Heroldo pli kaj pli forlasas la movadon kaj estiĝas vera mondnovaĵa gazeto; nur tiam, kiam nova membro de UEA pagas sian kotizon en oktobro kaj ricevas la revuon Esperanto kaj membrecon por unu jaro, anstataŭ nur du monatoj, kiel nun!; nur tiam, kiam la mekanismo de la movado mem estas raciigita; nur tiam, kiam la organiza strukturo de la movado estas multe pli logika kaj spegulas la rapidmovan, modernan "Telstar"-mondon; nur tiam, kiam la movado aspektas moderne kaj agas moderne kaj ĝi funkcias glate kaj efike - tiam, kaj nur tiam oni povas komenci studon por trovi la fonton de publika apatio al nia lingva propono. Ĉu vi kredas ke la apatio ekzistos tiam?

La verkinto de la ĉi-supra artikolo (kiel ankaŭ la redakcio de la JEN-Bulteno) ŝatus aŭdi pri aliaj ideoj pri ĝenerala modernigado de UEA kaj la tuta movado. La adreso de Richard Kollin estas:
30 Avenue B, New York, N.Y. 10009.

* * * * *

Por la Kanada Kongreso de Esperanto (26 junio 1964) oni deziras turismajn kaj aliajn esperantaĵojn, por ekspozicio. Adreso de la kongreso:
68 McNaughton Avenue, Ottawa 1, Kanado.

Mi rajtas nur al tute malgranda spaco: tajpi cent paĝojn da JEN-Bulteno estas iom neebbla por ekzamensieĝata Esperanto-klubo kiel tiu de Harvard. Legi ilin prezentus verŝajne similajn problemojn al nia membraro.

Sed malofte venas okazo publike kaj pozitive (t.e. kontraste al negative) kritiki la Esperanto-movadon, kaj kiam prezentigas la okazo oni emas vere karnavali. Mi ŝatus, ekzemple, skribi pri organizaj problemoj en UEA, pri fundamentaj demandoj kiel Kion ni celas per Esperanto? aŭ: Kia ni konsideras Esperanton? aŭ Kial entute ni ĝenas nin (aŭ ne ĝenas nin) labori por ĝi? Sed ĉio ĉi ne eblas: mi devas limigi min. Do, mi elektis simple kelkajn laŭ mi komentendajn mankojn de la nuna Esperanto-movado. Per ili mi celas pensigi vin: mia celo pli similas al sugesti ol aserti.

Nescio. La homo kiu lernas Esperanton ne lernas simple lingvon. Eĉ li ne simple lernas lingvon plus movado. Li lernas fakte mistifikaĵon. Estis epoko--tion ni ĉiuj scias--kiam la meza esperantisto portis dek flagojn kaj sortimenton da insignoj, kantis La Himnon, parolis pri la Interna Ideo kaj predikis tutmondan amon--ĉiam kun horore batalema mieno. Kvankam ankoraŭ ekzistas tiaj homoj, ili konsistigas mortantan rason. Anstataŭas ilin nun tiuj homoj kiuj preskaŭ normalas sed ne tute--tiu speco de mensmalsanuloj kiuj aspektas tute normalaj ĝis oni bone konas ilin kaj rimarkas la etajn strangaĵojn. Ĉi tiuj novuloj pretendas al objektiveco, parolas pri modernaj reklammetodoj kaj tiel plu. Sed ili fakte nenion scias pri modernaj reklammetodoj, nek pri aliaj lingvoj (pri kiuj ili tamen prelegas antaŭ neesperantistoj) nek pri politikaj aŭ kulturaj cirkonstancoj en tiu aŭ alia lando. Se homo volas sukcesigi ion ajn ĉi-monde li devas aspekti saĝa--saĝa al lingvisto se li parolas pri lingvoj, saĝa al reklamisto se li parolas pri informado, ktp. Lastatempe mi legis perfekte objektivan anglalingvan artikolon pri la pretendo de Esperanto, en kiun tamen ŝteligis granda makulego kiu iom tipigis por mi ĉi tiun specon de "kvazaŭobjektivo". Parolante pri Esperanto kaj la rifuzo de la instancoj akcepti ĝin kiel ŝtatan ekzamenan temon la verkinto diris ke tamen oni jam akceptis "kelkajn afrikajn dialektojn". Dialektojn! Temis pri lingvoj kiel la joruba, kun kelkaj milionoj da parolantoj! Se lingvisto legus la koncernan artikolon li konkludus ke la skribanto ne konas la diferencon inter lingvo kaj dialekto (malfacile decidebla, tamen!) kaj ke li plene

malestimas (laŭ la konata imperiisma maniero) ĉi tiujn "neevoluintajn" afrikanojn.

En similan kategorion oni metu ankaŭ tiujn naivulojn kiuj sugestas ke ĉiu afrikano "lernu Esperanton" anstataŭ tiuj koloniismaj lingvoj, ne konstatante ke en monda politika kadro Esperanto ankoraŭ senutilas, ke mankas al Esperanto grandparte teknika vortprovizo (malgraŭ la hercaj paŝoj jam faritaj tiurilate), ke mankas teknikistoj, instruistoj ktp. kiuj kapablas ĝin, kaj ke plene mankas lernolibroj en Esperanto (t.e. ne pri Esperanto). En landoj kiel Hindujo, Tajlando, Afganistano, kie ajn, oni ne uzas la hindian, aŭ tajan aŭ afganan por instrui en universitato biokemion aŭ kristalografion--ĉar libroj kaj teknika vortprovizo (kaj ofte instruistoj) pri biokemio aŭ kristalografio mankas en la india aŭ taja aŭ afgana. Oni do uzas la anglan aŭ francan aŭ similan bone dotitan (pri biokemio kaj kristalografio) lingvon. Kaj kiam temas pri biokemio aŭ kristalografio, Esperanto estas en sama kategorio kiel la taja--aŭ kiel la joruba!

Sed ĉi tiu miriga nivelo de nescio kiu regas inter la esperantistaro, ne estus katastrofa se ne aldoniĝus pli drasta manko. Ne nur la esperantistoj estas nesciaj, ne nur ili nomas sin ekspertoj pri tio kion ili ne komprenas, sed ili kvazaŭ kulpigas la neesperantistojn pro eminenta stulteco ke ili ne konstatas la valoron de Esperanto. Kaj ĉi tiu fundamenta sento de kulpigo daŭre venenigas la rilatojn inter esperantistoj kaj neesperantistoj. "Se ili estas tiel nedankemaj ke ekzistas Esperanto, do ni ne plu ĝenos nin pri ili." Ĉi tiu sinteno havas interesajn rezultojn. Informado direktita al la publiko kun tiu malantaŭa sento kutime malsukcesas. La publiko simple ne dankemas. Esperantistoj seniluziiĝas. Sed (jen la miraklo!) ili ne seniluziiĝas pri Esperanto, ili simple seniluziiĝas pri la publiko! Ili pasigas pli da tempo interŝanĝante poŝtmarkojn aŭ fiŝercojn kaj malpli da tempo je informado al nedankemaj stultuloj. La movado sekve fariĝas pli kulteca kaj pli enfermita kaj pli sencia pri la ekstera mondo ol antaŭe. Kiel rompi la cirklon? Dio scias. La baza demando estas: Ĉu oni devas havi psikajn mankojn por eĉ kredi je Esperanto? aŭ ĉu ni simple havas en la movado iom tro da homoj kun psikaj mankoj? Al la unua stato kompreneble ne estas solvo. Al la dua supozeble ekzistas solvo, sed trovi ĝin malfacilas. Ŝajne necesas pli da objektiva informado al Esperantistoj ne nur pri Esperanto sed pri la mondo, pli da ekspertaj studoj, pli da humilo pri la propra scio.

Informiteco. Kaj jen leviĝas la demando de ĝustaj informmetodoj.

4

La gvidaj esperantistoj estas fakte la ĉefaj kulpuloj pro la manĝo de scio inter la Esperanto-publiko. Ni ĉiuj scias ke ekzistas Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. Sed kiom da ni iam ajn vidis (por ne paroli pri legi) dokumenton de CED? Ĝis antaŭ kelkaj semajnoj simple ne ekzistis iu ajn metodo laŭ kiu ordinara unuope esperantisto povis aĉeti (eĉ) la dokumentojn, krom per iu speciala mendo al la Centra Oficejo de UEA. Kaj ankoraŭ nun ne ekzistas, laŭ mia scio, iu listo de haveblaj dokumentoj kiun oni povas ricevi de UEA. Kelkaj el ĉi tiuj dokumentoj (kaj mi, feliĉe, ricevas ilin de tempo al tempo se mi speciale petas) estas valoregaj studoj de la koncernaj temoj. CED funkcias per tute malgranda ĉiujara monsumo, kaj ĝin gvidas homo kies gravaj oficoj inkluzivas tiun de Ĝenerala Sekretario de UEA. Li havas nek tempon nek monon eluzi ĉiujn eblecojn kiujn devus eluzi organizo tia kia estas CED. La etaj financaj rimedoj de la organizo estas uzataj por farado de dokumentoj kaj ilia sendado al neesperantistaj organizoj kaj instancoj. Tute certe granda parto de tiuj dokumentoj (kompreneble aperigataj en la ĉefaj naciaj lingvoj) atingas nur la rubaĵujojn de la gravaj internaciaj organizoj al kiuj ili sendiĝas, sed tio estas neeviteblaĵo de la tuta entrepreno. Tamen, ankaŭ la esperantistoj devas (laŭ mi) havi la okazon ricevi ĉi tiujn dokumentojn--en Esperanto, por la propra informo--kaj en naciaj lingvoj por informa uzado de neesperantistoj. UEA nun komencis fari paŝojn por tio ebligigi (vidu la revuon Esperanto, marto 1964, p. 50)--sed homoj absolute devas pli bone scii kiuj dokumentoj haveblas. Ĉu ne eblas, ekzemple, aperigi de tempo al tempo liston en Esperanto kaj regule ĝin meti en la Jarlibron de UEA--kaj ne nur por dokumentoj en Esperanto sed ankaŭ por tiuj en aliaj lingvoj? Sed la dokumentoj de CED pritraktas ĉefe nur temojn kiuj rekte rilatas Esperanton kaj ĝian bezonon en la mondo. Ili tute ne tuŝas du aliajn tre gravajn temojn--unue, informojn pri la faktoj de internaciaj rilatoj; due, informojn pri la esperantistoj mem.

Hedaŭrinde, estas konsiderinde pli facile diri vastskale stultaĵojn en la Esperanto-movado ol estas en preskaŭ ĉiu ajn alia kulturo. Estas pli da Esperanto-gazetoj ol aperiginda materialo: ĉiam ĉiu frenezulo povas trovi lokon por siaj frenezaĵoj. Krome, la esperantistoj avido ellegas siajn gazetojn, kaj la plej eta stultaĵo tute en angulo de iu multobligita paĝo ne eskapos la atenton de nia reza esperantisto, nia "filstultisto" (por bele greki pri la afero). Io, des pli gravas, ke oni kontraŭbatu ĉi tiujn idiotaĵojn, ne per protestaj leteroj sed per kelkaj faktoj. Oni ne povas tute nature aŭdi ke homoj saĝos: ĉiuj pruvoj, sciencaj kaj metafizikaj, klare

la kontraŭon. Do, anstataŭ ofendiĝi pri la stulteco de aliaj homoj, ni simple bombardu ilin per sagaco. Niaj gazetoj dediĉu multe pli da tempo al la fakta lingva situacio en komerco aŭ la fakta eduka situacio en Indonezio kaj ne simple al la bezono de Esperanto kiel solvo de tiu aŭ alia eble neekzistanta problemo.

Kiam temas pri Esperanto mem mi neniam sukcesis kompreni kial entute la lingvistoj, socioloĝoj, kaj beletristoj dediĉis tiom malmulte da tempo al la studado de Esperanto kaj ĝia movado simple kiel ekzistanta lingva kaj kultura fenomeno (t.e. tute ne juĝante pri ĝiaj meritoj kaj mankoj). Krom kiam temas pri konvinkitaj esperantistoj (t.e. kredantoj je la lingvo plus la baza ideologio) oni preskaŭ (eble eĉ tute) neniam faras studojn simple pri tiu aŭ alia aspekto de la lingvo; studoj pri la movado kiel kulturo tute ne ekzistas; altnivelajn literaturajn studojn oni povas nombri per la fingroj de unu mano. U nu kaŭzo de tio estas ke la esperantistoj mem ne sifiĉe serioze rilatas al sia lingvo. Mi iam en konversacio kun amiko, venis al konkludo ke la kialo de la rifuzo de la britoj malgrandigi siajn monerojn (nuntempe porti 12 pencojn en unu poŝo preskaŭ ne eblas - almenaŭ sen sufiĉe ampleksa zonsistemo ĉe la pantalone) estas ke radike kaj subkonscie ili kredas ke pondoĵ, ŝilingoj, kaj pencoj estas la sola vera mono en la mondo: la aliaj monsistemoj estas fakte nur ludoj. Simile, kiam du italoj kune parolas, la meza brito (kaj la meza usonano) sopiras ke ili parolu veran lingvon (nome la anglan) kaj ĉesu sencece babilaĉi unu al la alia. Jen la ofta rilato de esperantistoj al Esperanto: ĝi ne estas vera lingvo. Ĝi estas ia ludo, en kiu validas tute aliaj valoroj ol en la ekstera mondo. Ankaŭ ĉi tiu sinteno, kompreneble, kontribuas al la fermiteco de la Esperanto-movado, al la kulteco. Kaj ĝi krome kontribuas al la hobiismo, al amatorismo kiu rampas ĉie inter ni. Tiuj niaj kelkaj eminentuloj - t.e. komoj kiuj eminentas en la ekstera mondo - kaj ili estas nur kelkaj: ni ne troigu (mi aldonu, parenteze, ke Tolstoj ne lernis Esperanton en 24 horoj - kaj ni bone sciis tion se ni eĉ plej birdcerbe pensus), tiuj niaj kelkaj eminentuloj kutime ne faras sciencajn studojn pri Esperanto ĉar ankaŭ ili, ie, subkonscie, pensas ke ĝi estas nur ludo, samnivela kiel ĉasado, aŭ teniso, aŭ promenigo de hundo en parko dimanĉon matene. Kaj se tiu nia teorio pravus, la solvon ni neniam plene trovos. Simple necesas ĉiam kaj ĉie altigi la prestiĝon de Esperanto kaj, sekve, de ni mem - ne paroli pri "afrikaj dialektoj", ne plori se iu organizo ne dankas al ni pro la de ni al ĝi prezentita busto de Zamenhof, ne lavi la piedojn en la manpelvoĵ de la kongreseja necesejo. Se la aliaj malpli "ludos" pri kaj per Esperanto; eble tio ankaŭ igos nin pensi ĝin

(daŭriĝo sur p.28)

ĈU VI POVAS RESPONDI AL ĈI TIUJ?:

Gian-Carlo Figliera

PLEJ OFTAJ ANTAŬJUĜOJ KONTRAŬ ESPERANTO

1. La estiĝo de lingvo estas rezulto de natura jarcenta procezo en la sino de iu popolo. Artefarita lingvo ne povas esti vivanta.
2. Esperanto eble taŭgas kiel kodo por komerco, sed ĝi ne estas kulturita natura lingvo kaj pro tio ĝi ne povas esprimi nuancojn de la penso kaj poeziajn sentojn. Esperanto havas nek literaturajn tradiciojn nek literaturon nek poetojn.
3. Esperanto ne estas utiligebla kiel scienca lingvo. En Esperanto ne ekzistas scienca literaturo, nek sciencaj terminaroj, kaj neniu sciencisto uzas Esperanton. Esperanto ne havas, ekzemple, la flekseblecon kaj la precizecon de la germana, nek la grandan disvastiĝon de la tradiciaj sciencaj lingvoj.
4. La vera internacia lingvo, kiun hodiaŭ ĉiuj uzadas, estas la angla. Konsiderante la disvastiĝon de la angla lingvo, ĝian kreskantan influon kaj la kvanton da verkoj en ĝi produktataj en ĉiuj partoj de la mondo, estas utopie supozi, ke Esperanto povus iel konkurenci kun ĝi. Se iu alia lingvo devus en la estonto anstataŭi la influon de la angla, tiam estus la franca aŭ la germana aŭ la rusa.
5. Se post pli ol 70 jaroj Esperanto ne sukcesis fariĝi iom populara, tio signifas, ke ĝi ne havas en si la ecojn por ludi la rolon de internacia lingvo kaj ke ĝi neniam sukcesos.
6. La naciaj lingvoj esprimas la animon de la popoloj, en kiuj ili spontanee elkreskis. La ekzisto de la naciaj lingvoj estas esenca por la ekzisto kaj esprimiĝo de la socio. Esperanto volas anstataŭi la naciajn lingvojn kaj sekve ĝi estas negativa fenomeno.
7. Esperanto ne havas praktikan valoron: ĝi estas uzata en neniu internacia renkontiĝo kaj oni preskaŭ ne povas trovi personojn, kiuj konas ĝin.
8. Se artefarita lingvo estus vere utila, tiam ni devus elekti inter diversaj artefajta lingvoj, kelkaj el kiuj estas pli bone konstruitaj ol Esperanto. Interlingua, ekz., estas tuj komprenebla por plej parto da personoj, dum Esperanto, pro sia arbitra radikelektado, stranga ortografio kaj siaj kontraŭsciencaj pluraloj en "j", aspektas fremde.
9. Eĉ se Esperanto post kelkaj jarcentoj sukcesus, kun la tempo ĝi dissplitiĝus en dialektojn, ĉar ĉiuj popoloj prononcas malsame Esperanton kaj iom post iom la esperantistoj havus malfacilaĵojn kompreni unu la alian.

10. Eble Esperanto estas relative facila por la okcidentanoj, sed la orientanoj (ekz. japanoj kaj ĉinoj) certe havas grandegajn malfacilaĵojn por ĝin ellerni. Do Esperanto ne nur ne estas egale facila por ĉiuj popoloj, sed ĝi estas nova kaŝita instrumento de supereco de la okcidentaj popoloj super la aliaj.

11. Esperanto estas kamuflita komunismo. Multaj esperantistoj estas konataj komunistoj kaj, cetere, Esperanto estas vaste uzata por propagandi la t.n. "popoldemokratiajn landojn" kaj por disvastigi la internacian komunismon.

12. Esperanto naskiĝis en la fino de la pasinta jarcento inter multaj sentimentalaj utopioj de la tiama stburga mentalo. Ĝi estas frukto de kosmopolitaj diktrinoj de la kaduka pacifismo kaj celas forpreni la atenton de la laborista klaso de la batalo kontraŭ la internacia kapitalismo.

PLEJ OFTAJ DEMANDOJ DE ĴURNALISTOJ
(DUM KONGRESAJ GAZETARAJ KONFERENCOJ)

1. Kiom da partoprenantoj havas la Kongreso? El kiom da landoj?
2. Ĉu aliaj kontinentoj estas reprezentitaj? Ĉu venos delegitoj de trans la Fera Kurteno?
3. Kiu estas la celo de la Kongreso? Kiujn temojn ĝi pritraktos? Kiuj konkludoj estas antaŭviditaj?
4. Kiom da esperantistoj ekzistas en la mondo?
5. Ĉu Esperanto estas instruata en iuj lernejoj?
6. Ĉu ekzistas literaturo en Esperanto? Ĉu Esperanto estas uzata por fakaj kaj sciencaj celoj?
7. Ĉu iu registaro oficiale apogas Esperanton? Ĉu la nuna Kongreso ĝuas oficialan subtenon?
8. Kiu estas la sinteno de gravaj internaciaj organizaĵoj (ekz. la Unuigintaj Nacioj) rilate al Esperanto? Ĉu iu el tiuj organizaĵoj jam enkondukis Esperanton?
9. Ĉu Esperanto estas ligita al iu religia, politika aŭ alia doktrino aŭ ideologio?
10. En kiu lando Esperanto estas plej multe disvastigita? Kiel statas ĝia pozicio en Azio kaj Afriko? Kiun sintenon havas Britujo kaj Usono?
11. Kiu estas la sinteno de la komunistaj landoj rilate al Esperanto?
12. Kiaj estas la perspektivoj de Esperanto en proksima estonto? Ĉu ekzistas seriozaj eblecoj, ke ĝi estu enkondukita en ĉiujn lernejojn de la mondo?

plenrajta lingvo, kaj serioza afero.

Solidareco. Ekzistas skolo de esperantistoj, grupiĝinta ĉefe ĉirkaŭ la Estraro de UEA, kiu celas precize ke oni ja traktu la lingvon kiel seriozan aferon. Tiun sintenon oni absolute devas gardi kontraŭ unu grava afero - nome, spirito de netolero. Ĉi tie ne decas (nek spacas) eniri la diversajn malakordojn interne de la movado - malakordoj kiuj parenteze en si mem montras la viglecon kaj fortan entuziasmon kaj mankon de apatio de la esperantistaro - sed ĉi tiuj malakordoj, ni rimarku, povas ludi utilan rolon nur tiam kiam estas libera interŝanĝo de pozitivaj opinioj.

Ekzistas homoj ĉie kaj ĉiam kiuj malicias - kiuj subfosas kaj kiuj klopodas malhelpi la laboron kiun faras la aliaj. Tiuj homoj kritikis negative. Pri ili mi ĉi tie ne parolu. Sed ekzistas amaso da aliaj kiuj ne ĉiam konsentas kun ĉiu detalo de tio, kion faras la estroj de la Movado. Ili volas esprimi sian nekonsenton ne por subfosi, sed por influu. Tiuj homoj rajtas al voĉo kaj ili rajtas al aŭskulto. Baze iliaj celoj samas kiel tiuj de la estroj: simple ili ne samopinias pri detaloj de la metodo atingi tiujn celojn.

En nia movado ni devas celi al samceleco: libera interŝanĝo de opinioj interne de baza interkonsento pri celoj. Anstataŭe ni riskas atingi solidarecon: en kiu tiun interŝanĝon oni sufokas en la nomo de pli altaj idealoj. La risko, kiu kuŝas en tio, estas grandega.

Per "solidareco" ekzistas ĉiam risko ke oni bele haltigos la penskapablon aŭ pensemon de la individuaj esperantistoj. Ekzistas risko ke oni perdos kontakton kun ili, ke oni lasos pasi bonajn ideojn kaj ke oni trovos sin post kelkaj jaroj sen kapablaj gvidantoj (simple ĉar oni ne edukis la publikon al gvidado).

Multaj angloparolantoj konas la poemeton de Hilaire Belloc pri la knabinaĉo Matilda kiu daŭre vokas nenecese la fajr-brigadon, kaj la tagon kiam fakte okazas incendio, Matilda denove vokas kaj ricevas nur la respondon "Mensogulino". Kompreneble, ŝi fine forfritiĝas - ĉar oni ekdubis pri ŝia kapablo distingi inter incendio kaj manko de incendio. Simile al tiuj usonanoj, kiuj vidas komuniston malantaŭ ĉiu arbo, estas tro da esperantistoj kiuj kredas ke ĉiu kritiketo estas "atako", ke ĉiu eraro estas "mensogo", kaj ke ĉiu malkonsento estas "protesto". Tian manieron de agado mi persone malamegas. Mi trovas ĝin nenormala, fanatika, kaj agado kiu okazus nur interne de movado fermita en sin mem.

Kompreneble, ĉi tiu konduto senkuraĝigas ankaŭ aliajn tute saĝajn homojn kiuj volas kritiki ion por ĝin plibonigi. Mi donu ekzemplon... La Universala Kongreso en Sofio en 1963

estis la plej tuse organizita kongreso kiun mi ceestis dum mia tuta esperantisteco. Tiu esperantisteco ne estis longa, sed ĝi jam inkluzivas ses Universalajn Kongresojn. Tute sincere dirite, la Universal Kongreso de '63 estis organiza fiasko, kaj la fakto ke la ĉeestintoj aŭ timis diri tion aŭ mensogis en la nomo de iu pli alta idealo tute ne helpis al la fido de la publiko pri la organizkapablo de UEA (kiu nedisigeble asociiĝas en la mensoj de la publiko kun la fuŝoj de la UK). "Se UEA tute ne rimarki fuŝojn, eble UEA kutimas fuŝi? Eble la venontjara Kongreso egale fuŝoplenas?" - jen la ebla rezonado de esperantisto kies unua kongreso estis tiu de Sofio. Mi komprenas liajn dubojn. Sed pri Sofio regis kvazaŭ konspiro de silento. Kiu menciis la fiaskon de la teatraj biletoj, la nekapablajn salutantojn el Hispanujo kaj Israelo dum la Solena Malfermo, la centprocente fuŝa deĵorado ĉe la giĉetoj en la kongresejo? Neniu. Denove temis pri "brila manifestacio", pri "amikaj kaj helpemaj organizantoj, pri "neforgesebla harmonio". Mensogi en la nomo de solidareco ŝajnas al mi relative nepardonebla...

Aliaj ekzemploj abundas. William Auld, ekzemple, kreis tute novan eŭfemismon nomante Ivan Georgiev "minora poeto" - kaj tre malmultajn kritikojn mi vidis ekzemple pri la nova poemaro de Maura, kiun mi persone trovas sufiĉe mezkvalita, minora, aŭ kio estas la ĝusta esprimo. Sed kritiki esperantan literaturon "malhelpas vendi ĝin, kio malhelpas eldoni ĝin, kio malhelpas ke entute oni verku ĝin." Sed kuŝas unu falsa logikaĵo tie: prefere oni tute ne eldonu malbonajn literaturaĵojn, kaj la recenzistoj absolute ne timu informi al la eldonistoj ke tiu aŭ alia speco de "minoraĵo" senvaloras kaj ke prefere oni estontece ne insultu la legantaron eldonante ĝin. Kaj se oni daŭre produktas malbonajn librojn kaj la kompatindaj legantoj ne povas distingi (pere de la recenzoj) la kelkajn bonajn disde la amasaj malbonaj, la eldonistoj ne tro bleku kiam la legantoj simple ĉesas aĉeti. Solidareco, do, ankaŭ ĉe literaturo kondukas al apatio kaj misinformoj kaj al tia tute speciala malsano "minoreco".

Frateco. Solidareco estas tamen relative malgranda danĝero apud la al ni ja unika malsano de frateco. Tio kio ŝokas pri la mortigo de Habelo fare de Kaino ne estas la murdo en si mem sed la murdo de frato. Kaj ni (agordu viajn brustojn!) estas "fratar'" - ni frate amas nu la alian, kaj, sekve, frate malamas. Niaj kvereloj estas do des pli emociplenaj, des pli neraciaj, des pli dividaj. Se mi malamas s-ron Smith, mia najbaro, li verŝajne ne tro ĝenas sin, sed se mi malamas mian fraton, jen tute alia afero.

Parte ĉi tiu "frateco" ŝuldiĝas al la mistiko de Esperanto, kaj parte ĝi estas rezulto de la fermiteco de nia rondo. El ĝi naskiĝas la nereala graveco kiun oni atribuas al solidareco.

En fermita rondo, bedaŭrinde, ni ne ĉiam povas eviti tiajn kiujn

ĉar mi havas mirindan mankon de intereso pri filatelio aŭ naturismo aŭ bredado de kolomboj, do mi simple trovas miajn geamikojn aliloke. Eĉ se mi ne ŝatas mian fraton, kvankam tio ŝokos mian patrinon, tamen kutime eblas eviti lin. Sed la esperantista familio kvazaŭ troviĝas sur dezertinsulo: simple necesas kune vivi kun s-ro Smith kaj liaj poŝtmarkoj, nudeco kaj kolomboj - kaj eĉ ami lin kiel fraton! Kompreneble kelkaj homoj devias de tiel strikta normo. La solvo, se estas solvo, kuŝas en detruo de la sento de rondo familia - kaj eĉ la forvelko de la flagflirtigantoj tamen ankoraŭ ne havis efikon je ĉi tiu ofte subkonscia stultaĵo.

Universalaj Kongresoj. Por tiuj kiuj volas observi spirflare proksime la malsanojn de nia Movado, mi ne povas proponi pli bonan manifestacion ol la kutima Universala Kongreso. Per tio mi ne volas diri ke UK-oj estas senesperigaj aferoj. Tute male: ili kutime donas novan injekton de entuziasmo. Sed Universala Kongreso, kiel oni atendus en la Esperanto-movado, tute ne similas neesperantistan kongreson. Ĝi estas samtempe renkontejo por malnovaj geamikoj, feriloko, ripozejo, laborejo, piedbanejo, politika manifestacio, kaj jara ekzercejo por kantado kaj plifortigo de la flagflirtiga brako. Se oni ĉeestas la ĝustajn paroladojn kaj spektas la ĝustajn vesperajn aranĝojn, jes ja oni revenos hejmen entuziasmigita - se, fakte, oni agas kiel ĉiu ajn partoprenanto de normala neesperantista kongreso. Mi ne estas studinto de la historio de Universalaj Kongresoj (kio fakte estus tre interesa studo), sed mi preferas konsideri Universalan Kongreson simple kiel "normalan" kongreson kun amaso da aldonitaj cedoĵoj al la kulteco kaj "frateco" de la esperantistaro. Okazas laborkunsidoj (kiujn la "frataro" kompreneble emas eviti, aŭ fuŝi) sed ili estas grave malhelpataj per superfluaĵoj programeroj, kiuj forlogas la homojn de ilia laboro. Precize pro ĉi tiuj superfluaĵoj granda parto de la kongresanaro ĉeestas la kongreson. Des pli bone, do, ke oni eliminu ilin: pli malgrandaj kongresoj kun iom pli da celkonscio eĉ povus fariĝi veraj forumoj por interŝanĝo de opinioj, veraj laborejoj - kaj veraj seriozaj kulturaj manifestacioj.

Antaŭ kelkaj jaroj mi havis la okazon prezenti al la Studo-Klubo en Londono, kiun tiam estris d-ro Lapenna, Marek Wajsblum kaj aliaj, miajn ideojn pri plibonigo de la Universalaj Kongresoj. Kelkaj tiuj ideoj nun ŝajnas al mi plene fuŝaj - ĉefe ĉar mi nun ĉeestis pli da Universalaj Kongresoj kaj pli intime konas la organizan aparaton kiu kuŝas malantaŭ ili. Ĉi tie mi ne detale klarigu mian nunan vidpunkton: spaco mankas. Tamen, jen kelkaj laŭ mi tuj realigeblaj ideoj:

-- Oni plilongigu la daŭron de aranĝoj en la kongresa urbo ĝis dek tagoj (merkredo ĝis sabato) anstataŭ la nunaj sep (sabato ĝis sabato).
 -- La Internacia Somera Universitato okazu dum la unuaj tri tagoj de la kongreso (merkredo, ĵaŭdo, vendredo). Ĝi havu apartan kotizon kaj ne estu malfermata al la tuta kongresanaro. Oni akceptu nur limigitan nombron da studentoj. Ĉiu profesoro prezentu du, eventuale tri, prelegojn, en serio (tagon post tago). Partoprenu entute ĉ. kvin profesoroj (kiel nun) el plej diversaj fakoj (por eviti ke studentoj klopodu ĉeesti kvin prelegojn en unu tago!). Se eble, almenaŭ unu profesoro pritraktu Esperantan temon (historio, literaturo, aŭ simila). Post la kongreso, la prelegoj de la Universitato eventuale aperu libroforme eldonitaj de UEA. La celo de ĉi tiu ŝanĝo: forigi la "manifestacian" karakteron de la Universitato, seriozigi ĝin, kaj igi ĝin utila. Nuntempe ne eblus lerni ion ĉe la ISU. Kion utilan povas diri profesoro en la daŭro de unu malgrasa horo, al tute diversigita aŭskultantaro kiu ne komprenas lian fakon? Estas fantazie (aŭ solidarece) supozi ke entute la nunaj ISU havas ian ajn meriton krom (mensogeta) propagandan valoron.

-- La kunsidoj de la Komitato de UEA komencu tiun saman merkredon, kaj ili daŭru ĝis la fruaj tagoj de la posta semajno, tiel ke la Estraro de UEA povu kunsidi dum la cetero de la kongreso jam sciante ĉiujn decidojn de la Komitato, kaj la komitatanoj liberiĝu por kunsidoj de komisionoj kaj fakaj organizoj, kaj por laborkunsidoj de kongresaj "sekcioj".

-- Dum la unuaj tagoj de la kongreso okazu la ĉefaj solenaĵoj de la kongreso: eventuala akcepto de la lokaj instancoj, gazetaraĵ konferencoj, ktp; kaj ankaŭ eventuala Cseh-seminario (por instruistoj) dum la samaj tagoj kiel (eĉ en la kadro de) la ISU.

-- La ĉefaj artaj manifestacioj de la kongreso estu (kiel nun): teatra vespero, belarta konkurso, oratora konkurso kaj (eble) deklama konkurso kaj muzika vespero. Ne prezentigu superfluaĵojn (en tiun kategorion mi kompreneble ne inkluzivas evidentajn meritoplenajn entreprenojn kiel Angoroj, la unua vere plenrajta filmo en Esperanto); kaj la kongresa organiza aparato ne ŝargigu je la aranĝo de superfluaĵoj urbaj rondvojaĝoj kaj postkongresaj ekskursoj (sole unu ekskursan tagon oni enprogramigu): tiujn ili povas transdoni al komerca entreprenado je komercaj prezoj, se entute ili devas okazi.

-- Oni plialtigu la kongresan kotizon por kovri la kostojn de pli bona dokumentado (fakte, nuntempe dokumenta servo de la UK-oj pli-mapli ne ekzistas) kaj por mallogi tiujn kiuj povus pli malaltnoste ferii aliloke.

-- Junularan Vesperon oni prefere forigu de la programo: la junularo
 (daŭrigo sur p.47)

*
*
* aŭ
*
*

KIO NE MANKAS

de Mandragero

Kun granda plezuro ni povas anonci ke la lastatempa aviadila katastrofo ĉe Monto Nepagipova en Paronimi estis kaŭzita pure kaj absolute per lingvaj problemoj. Laŭ raportoj kiujn sendis al ni niaj Paronimiaj samideanoj, la kraŝo okazis simple ĉar la piloto de la aviadilo (kun 156 pasaĝeroj), kiu estis nederlandano, miskomprenis la instrukciojn transmisiitajn de la kontrolejo ĉe la flughaveno de Adiabata. La transmision oni faris en la Paronimia lingvo. Li konfuzis la Paronimian vorton por "mil" (dnasuohteno) kun tiu por "cent" (ool), kaj rezulte malaltigis sian flugvojon tiel ke li koliziis kun la monto - ĉe precize tiu loko kie troviĝis granda dinamita fabrikejo. La kraŝo de la aviadilo tuj kaŭzis ekbrulon de la fabriko, kaj la rezultaj eksplodoj daŭris entute du tagojn, mortigis pli ol 1000 homojn en najbaraj vilaĝoj, kaj vundis plian dekmilon. Se la ŝanco favorus nin, granda parto de tiu dekmilo ankaŭ mortos dum la venonta varmsezono en Paronimio...Kaj la tuta katastrofo okazis simple ĉar homoj ne konstatis la avantaĝojn de Nia Lingvo!!!

"Sir -

I see in Sam Barnes's article (February 9) the old fallacy that snuff-taking is a 'filthy habit'.

Snuff, taken properly, is a most elegant social custom. It is only the inexperienced who sneeze and splutter. Your true snuff-taker is very unobtrusive.

Reputable tobacconists will advise on the best type of the many blends and flavours for beginners to take at first. Gaily coloured snuff handkerchiefs can be used (there are as easily washed as any other), or tissues.

This most refreshing and stimulating way of taking tobacco is becoming very widespread. Over half a million people took it last year and the number is increasing daily.

- VIVIAN ROSE

President of the Society of Snuff Grinders, Blenders and Purveyors, London E.C.2. "

(- from The Observer, London)

Sir -

I see in Prof. Skrod Sztejk's article (February 30) the old fallacy that Esperantists are a 'bunch of nuts'.

Esperanto, spoken properly, is a most useful international asset. It is only the irresponsible who wave flags and sing anthems. Your true Esperantist is very unobtrusive.

Reputablâ instructors will advise on the best method among the many varied materials available for beginners who want to learn the language. There are even many cheerful and amusing records available (these are just as cacophonous as any other), or magazines.

This most entertaining and stimulating way of getting to know foreigners is becoming very widespread. Over half a million people spoke and used it last year and the number is increasing daily.

- LILLIAN CRABMEAT

President of the Society of Esperanto Grinders, Blenders and Purveyors, Cooper Station, New York.

Ulrich Lins, citante Prof. Rene Etiemble:

"La franca lingvo estas trezoro. Ĝin perforti estas krimo. Homoj dum la milito estis mortpafitaj pro perfido. Ili hodiaŭ devus esti punataj pro senval rigo de la lingvo..."

kaj citante Prof. Hugo Moser:

"Kiel en la armea praktiko, pro la progresanta integriĝo kaj la kuna disvastiĝo de anglaj terminoj kaj angla oficlingvo, povos esti konservata la pureco de la germana lingvo?"

kaj Hans Wingen, en 'Aktuala Terminareto':

"Oni petis min, doni klarigon pri la vorto genocido, Germane: Völkermord. Ĝi signifas la ekstermon de tuta grupo: raso, gento, popolo k.s. Ĝi estas kreita post la milito, antaŭ ĉio rigarde al faroj kiajn la mondo ligas kun nia germana nomo."

(Ĉio en sama numero de Germana Esperanto-Revuo)

"...La venonta numero /de la cirkulero 'Kristana Ekumeno/' traktos la reviviĝon de Kristo kaj mariologion. Atentu: La cirkulero estas multobligita per alkoholo, tio signifas, ke la literoj paliĝos en forta lumo!" - Dia Regno 2-64

"Antaŭ mi, sur la skribotablo, estas diversaj numeroj de Norda Prismo. Mi karesas ame ĝiajn paĝojn kaj kovrilojn, kvazaŭ la hararon de amata knabino."

- Nordamerika Esperanto-Revuo, feb.64.

La hungara edzino de franca basko lastatempe grave vundis sian edzon en klopodo lin murdi. La kialo? Manko de komuna lingvo: dum 20 jaroj ili kune vivis nur per signoj. La entreprenemo de s-ino Garroteur meritas ĉies laŭdojn: tiajn batalojn kontraŭ la stulteco de lingvaj baroj ni absolute bezonas - eĉ se nur por montri al la publiko la avantaĝojn de Esperanto. La redakcio deziras al nia amikino ankoraŭ pli bonan sukceson je la venonta fojo.

Grava Anonco: La ĉefministro de la afrika respubliko Bandamongio dankas al la 5240 geesperantistoj kiuj sendis al li dankleterojn post lia parolado antaŭ la Unuigintaj Nacioj, sed avertas ke fakte ellasiĝis la vorto "ne" el la protokolo sur kiu baziĝis la raporto en la Esperanto-gazetaro. La ĉefministro, s-ro Mbusto, aldonas, ke li devenas de tribo kiu parolas Volapük, rezulte de iama vizito de t.n. "Karavano de Amikeco" en 1884.

*
*
*
*

DEZIRAS KORESPONDI...

16-jara italino, studentino pri arkitekturo
- MARIA GABELLI, Via Citolo da Perugia 18, Padova, Italio

21-jara italino
- LAURA BECCEGATO, Fossalta di Trebaseleghe, Padova, Italio

italino, per il stritaj poŝtkartoj
- TERESA M. PIACENTE, Villa-Ferraioli, Albano-Laziale, Roma, Italio

argentina sinjorino, per ilustritaj poŝtkartoj, kun usonanoj
s-ino ADELA E.V. DE RIGONELLI, 25 de mayo 3313, Santa Fe, Argentino

(NI VOLAS SUBSTREKI ke ĉiam la JEN-Bulteno publikigos korespond-petojn senkoste kaj senhezite. Tamen, gravegas ke oni skribu preslitere aŭ per skribmaŝino, por ke oniaj nomo kaj adreso estu facile legeblaj)

Antaŭe ni diru, kio tromultas en la Esperanto-gazetaro. Estas tro da titoloj rilate al la eldonkvantoj. En la jaro 1962 aperadis 159 esperantaj revuoj, kies unufoja eldonkvanto estis 250 mil ekzempleroj. La meza eldonkvanto de unu esperanta revuo ĉirkaŭumas do 1700 ekzemplerojn. Grandparte la revuoj ne atingas eĉ mil ekzemplerojn kaj pluraj eĉ ne kvincent. La mezan ciferon altigas nur kelkaj revuoj, kiel ekzemple Esperanto (8000), Heroldo de Esperanto (3000), Nuntempa Bulgario (10000-18000). Komparo de la eldonkostoj de unuopaj revuoj konfirmas la konatan veron, ke eldonkostoj relative malgrandiĝas, se pligrandiĝas eldonkvantoj. Gazeto por esti memstara devas aperi en granda eldonkvanto.

Sintrudas simpla solvo: anstataŭ 159 revuoj en kuna eldonkvanto de 250 mil ekzempleroj, aperu unu en la sama kvanto. 250 mil ekzempleroj estas la proksimuma eldonkvanto de la altklasa Pariza Le Monde, kaj la Viena Die Presse. Tiu ĉi solvo estas tamen tro simpla por esti ebla. Por ion ajn solvi, antaŭe oni devas scii, ke la evoluon de la Esperanto-gazetaro determinas la disvastiĝo de Esperanto mem. Due oni devas scii, ke la movado prezentas mozaikon de nacioj, rasoj, religioj, kulturoj, sciniveletoj, politikaj orientiĝoj, kutimoj, gustoj, karakteroj. Estas absolute neeble redakti al tiel malsameca socigrupo unu komunan revuon. Tio ni konsideru la gazeton kiel faktan. Kaj fakte ĝi prezentas duoblan karakteron. Tute videble la esperanta gazetaro konsistas el du partoj: unu, por kiu Esperanto estas antaŭ ĉio celo; kaj la alia, por kiu Esperanto estas antaŭ ĉio aŭ ekskluziva rimedo (Esperanto aŭ Hungara Esperantisto unuflanke; Nova Civito aŭ Hungara Vivo aliflanke).

La "rimedgazetaro" (Okcidentgermana Revuo, El Popola Ĉinio, Vjetnamio Antaŭenmarŝas, Nuntempa Bulgario, ktp.) estas unu el la ekzemploj de efektiva apliko de Esperanto. Tie Esperanto ludas vere rolon, al kiu ĝi estas destinita, rolon de rimedo por interkompreniĝi en la internaciaj rilatoj. Okcidentgermana Revuo aŭ El Popola Ĉinio aperas tial, ĉar ĝi portas konkretajn rezultojn al la eldonantoj. Ju plimultaj esperantistoj, des pli certaj tiuj rezultoj. Jen kial la "rimedgazetaro" kreskas kaj kreskos plu.

Ni okupiĝu do nur pri la "celgazetaro" - pri la revuoj de la esperantaj (ĝeneralaj) organizoj. Tiun ĉi gazeton, escepte de la kelkaj revuoj, karakterizas malriĉeco de enhavo, amatoreca redaktado kaj teknika primitiveco. Rigardante la Esperanto-gazeton laŭ redakcia

vidpunkto, oni rimarkas, ke la redaktoroj ne tro komprenas la celojn de gazeto. La esperantaj revuoj ne posedas klaran koncepton, ne vid-ebligas el ili iu "politiko", estas malfacile respondi al si, legante iun revuon, kion fakte volas atingi la redakcio.

Kion fari? La esperanta gazetaro atendas reformojn. Ĝi ja povas kaj devas esti grava agadrimedo de la movado. Nun la gazetaro ekzistas dank' al la movado; estas eble, ke la movado ekzistu dank' al sia gazetaro. Tiucele estas necesa laŭgrada pligrandigado de la eldonkvantoj, por ke redakcioj povu agi ne nur apoge sur iluzia financa bazo, por ke oni povu dungii profesiulojn, plialtigadi la nivelon, kaj malaltigadi la prezon de la revuoj. La gazetaro devas pli aŭ malpli rapide forlasadi metion, transirante al industrio.

Lige kun tio, unu el la urgaj konkretaĵoj farendaj estas esperanta informagentejo. La malriĉeco de enhavo rezultas i.a. el la manko de regula alfludo de informoj kaj artikoloj al la redakcioj. La redaktoroj mem verkas artikolojn aŭ publikigas hazarde alsenditajn materialojn. Unu centra agentejo ŝanĝus la situacion sendante almenaŭ ĉiusemajne bultenon kun freŝaj informoj kaj artikoloj. Tiamaniere plialtigiĝus la revuoj, pliuuniĝus la agado de la tuta movado, kaj kreiĝus situacio, en kiu pli bonaj revuoj ensorbados malpli bonajn.

La Esperanto-gazetaro prezentas malsimplan demandon, kaj en unu artikolo oni povas nur diri nenion pri ĉio aŭ ĉion pri nenio. Ni devis do halti nur ĉe unu konkretaĵo kaj unu panaceo. Ni diru "panaceo" kompreneble nur, se ni konsideras, ke la Esperanto-gazetaro malsanas. Verdire, rigardante la rimedojn, per kiuj ĝi agas, oni ankaŭ povas admiri ĝian vivantecon.

Kun granda bedaŭro ni informas al niaj legantoj pri la morto de Prof. Hideo Yagi, ĝis antaŭ nelonge la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. Jam en marto Prof. Yagi decidis ekŝiĝi el sia posteno kiel Prezidanto pro daŭra malsano, kaj li fine mortis la 6-an de majo, en sia 65-a jaro.

Prof. Yagi estis sufiĉe grava historia figuro en tio, ke li estis la unua neeŭropa Prezidanto de UEA: li elektiĝis al tiu ofico en 1962. Li ankaŭ estis unu el la iniciatintoj de la preparlaboro por la unua Universala Kongreso de Esperanto en azia lando, okazonta venontan jaron en Tokio. Liaj kunlaborantoj en ĉi tiu grava entrepreno desplisentos la perdon.

Portempe agas kiel Prezidanto unu el la du Vicprezidantoj de UEA, s-ro Harry Holmes, el Britujo.

Nekrologo pri Prof. Yagi aperas en la junia numero de la Revuo Esperanto.

Fantaziu momente pri homo kun potencaj okuloj kaj oreloj, fortaj brakaj kaj kruraj muskoloj, kaj korpo farita el la plej bonstataj materialoj. Kio okazas, se lia cerbo estas maldiligenta kaj rifuzas kunlaborigi la organojn aŭ ordoni al ili taskojn? Nature, la homo stagnas, kiel vegetaĵo. Liaj atingoj neniel kompareblas al lia potencialo.

Tiu bildo ne estas fantaziaĵo, miaj amikoj: ĝi estas priskribo de la Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko. La potencialo de ELNA estas grandega. Unue, ELNA havas la lingvon Esperanto, pri kies merito ne necesas konvinki vin. Due, ELNA havas kompetentajn postenulojn kiuj dediĉas ĉiujare milojn da laborhoroj al la Ligo. Trie, ELNA havas la finanĉan helpon de pli ol 300 membroj, el kiuj multaj uzas ankaŭ sian penspovon por doni al ELNA bonajn, kelkfoje brilajn, ideojn. Kvare, ELNA funkcias en la Ŝtat-Unio de Ameriko, lando kies unika riĉeco ebligas al iu ajn boncela organizo ricevi ankoraŭ multe pli da tempaj kaj monaj donacoj ol ELNA ĝis nun havas. Kaj kvine, sumigante la Ŝtat-Unianojn kiuj lernus Esperanton por plenigi sian ĉiam pli multan liberan tempon, plus tiujn kiuj lernus ĝin por sia tre ofta vojaĝado aŭ por fariĝi pli mond-konaj personoj kun pli vastaj kulturaj ligoj, aŭ pro la idealisma sopiro al internacia kompreniĝo, aŭ pro lingva intereso, aŭ por helpi al si lerni pluajn lingvojn, aŭ pro diversaj aliaj kialoj, ni devas konstati ke la potenciala Esperantistaro de Ŝtat-Unio estas ne eta, sed tre granda!

Tial ELNA havas bonegan potencialon. Kial la sama organizo havas aĉegajn rezultojn? Ĉar ĝia cerbo simple ne funkcias! La cerbo de ELNA estas ĝia Estraro. Kio estas la Estraro? Ĝi konsistas el 9 personoj, elektataj po 3 jare, plus la Prezidanto kaj la Vic-Prezidanto. Kio estas la devoj de la Estraro? Laŭ la Statuto de ELNA, la Estraro devas "kontroli la tutan funkciadon de la Ligo" kaj "protekti la interesojn de la Ligo inter Kongresoj." Sed kiam temas pri la devoj de la postenuloj de ELNA, la Statuto estas tiom nepreciza kaj memkontrŭdira kaj multloke neklara kaj kelkloke tro rigida, ke la Ligo tuj mortus se ĝi provus sekvi la Statuton. Tial, tiuj partoj de la Statuto pri la devoj de la postenuloj fariĝis efektive nulaj kaj nerespektataj.

Anstataŭe, la Estraro prenis al si la rajton difini la devojn de si mem rilate al la komitatoj kaj aliaj postenuloj de ELNA. Tiu difino troviĝas en la Estrara Regularo, kiu estas la plej grava dokumento en ELNA. La Estraro adoptis tiun Regularon jam je la komenco de la Ligo,

en 1953, kaj ĝis nun ĝi ne ŝanĝiĝis. Per la Regularo, la Estraro decidis fari multe pli ol "kontroli" kaj "protekti": ĝi decidis firme regi ELNA.

Laŭ la Regularo, la Estraro "agas kiel la reganta organo de la Ligo, kunlabore kun la Prezidanto kaj aliaj postenuloj...." La Estraro "preparas...buĝeton" ĉiujare post la Kongreso, kaj neniu postenulo rajtas iam elspezi pli ol \$25 sen antaŭa permeso de la Estraro. "La Estraro nomas la Redaktoron de la oficiala organo kaj gvidas ĝian politikon." "La Estraro elektas la lokon de la jara Kongreso kaj nomas la Prezidanton de la Loka Kongresa Komitato...." La aliaj Komitatanoj kaj ĉiuj aranĝoj pri la Kongreso devas esti aprobitaj de la Estraro. La Estro de la Estraro (elektita de la Estraro el inter si) "nomas la daŭrajn kaj nedaŭrajn komitatojn." La Estraro nomas anstataŭanton, kiam iu ajn posteno en la Ligo vakigas. Kaj, plej vaste, "La Estraro de tempo al tempo adoptas tiajn aliajn regulojn kaj procezojn, kiajn ĝia sperto montras esti utilaj."

Jen la bazaj eroj el la Estrara Regularo. Relegu ilin kaj pripensu. Kaj tiam respondu al ĉi tiu demando: Por kia Estraro taŭgus tia regularo? Mi kredas ke vi konsentos kun mi, ke ĝi taŭgus nur por Estraro kies anoj ĉiuj estas aktivaj kaj ĉiuj loĝas samloke dum almenaŭ kelkaj semajnoj ĉiujare. Vi eble dubas ĉu la Estraro ne devus loĝi kune tutjare por plenumi tian Regularon. Prepari buĝeton, prilabori Kongresajn detalojn, tuj nomi anstataŭanton se grava postenulo, ekzemple Kasisto, eksigas, kaj ĝenerale gvidi kaj regi la tutan Ligon: ĉio tio ja bezonas unulokan, aktivan Estraron. Precipe ĝi postulas tre laboreman Estrarestron, kiu devas (laŭ neceso kaj laŭ la vortoj de la Regularo) esti la centro de komunikado por la Estraro, kaj inter la Estraro kaj la aliaj postenuloj kaj komitatoj.

La tragedio, amikoj, estas ke ELNA tute ne havas tian Estraron. La Estraranoj loĝas jen en Chicago, jen en Washington, jen en Gallup, jen en Boston: plene disaj tra la lando ili estas. Eĉ al Kongresoj povas veni nur parto ĉiujare. Do ili devas pritrakti siajn aferojn tute poŝte. Kaj ĉu ili estas tiom aktivaj ke ĉiu el la dek unu membroj povas sufiĉe detale komuniki kun ĉiu alia? Fakte, kelkaj Estraranoj entute ne komunikas, eĉ ne resendas al la Estrarestro balotilojn pri Estraraj rezolucioj. Kaj ĉu ni havas aktivegan Estrarestron? Absolute ne. Estas nur bonŝanco, memoru, se unu el la elektitaj Estraranoj ankaŭ disponas la tempon kaj havos la emon okupi la multe pli malfacilan taskon de Estrarestro. Kaj, se ne, la Estraro ne rajtas serĉi kompetentan Estrarestron ekster tiuj dek unu homoj jam en la Estraro.

La konkludo estas evidenta. La Estraro, disa kaj neaktiva, tute

ne povas plenumi siajn devojn laŭ la Estrara Regularo. Sed ĝuste pro la Regularo, neniu alia rajtas transpreni tiujn devojn, ĉar ili apartenas ekskluzive al la Estraro. La rezulto: la devoj simple restas neplenumitaj. Kaj ELNA stagnas. Ekzemple, se la Sekretario devas elspezi \$26 por remendi iun elĉerpitan informfolion, li devas antaŭe ricevi permeson de la Estraro. Sed se la Estraro simple ne agas pri lia peto, li povas fari nenion.

En 1963-4, la rezultoj de tiu situacio estis katastrofaj. Je la komenco, neniu el la Estraranoj ricevis pli ol unu baloton por Estrarestro. Tiam oni proponis la Estraranecon al iu ajn Estrarano kiu akceptos ĝin, sed ĉiuj rifuzis. Nur kvar monatojn post la Kongreso, kiam triono de la Estrara deĵoro jam forpasis, unu Estrarano kontraŭvole konsentis esti la Estro, kaj la Estraro povis komenci siajn aferojn. Lia originala hezitemo montriĝis saĝa, tamen, ĉar baldaŭ evidentiĝis ke li ne havas la tempon necesan por la alta posteno. Rezulte, rezolucioj proponitaj de Estraranoj, urĝaj komunikoj de la Sekretario, ktp. restis netraktitaj sur la tablo de la Estrarestro dum monatoj! La Estraro ne nur ne elektis la Prezidanton de la Loka Kongresa Komitato en Novjorko, sed faris

entute nenion pri la Kongresaj aranĝoj, malgraŭ pledoj de la LKK pri aprobo. Buĝeton la Estraro simple ne preparis, nek eĉ komencis prepari. Kiam Prezidanto Richardson komunikis al la Estrarestro sian eksigon, restis multe da tempo por trovi kandidatojn por ke speciala anstataŭiga elekto okazu dum la Novjorka Kongreso en 1964, kiel Regulo 15 de la Estrara Regularo preskribas. Sed la Estrarestro sidis sur la novaĵo tiom longe ke la Estraranoj informiĝis pri la eksigo nur post la datlimo por kandidatigoj! Tial la membroj de ELNA devos atendi ankoraŭ unu nenecesan jaron por elekti anstataŭanton. La Estraro faris nenion pri la anstataŭigo de la eksiginta Financ-Komitatestro. La Estraro eĉ ne oficiale informiĝis pri la deziro eksigi de Redaktoro Broadribb, ĝis multajn monatojn poste, kaj tute ne faris detalan serĉon por nova Redaktoro, kiel la gravo de tiu posteno meritas. Elĉerpiĝis nia baza informfolio, "A Language for the Jet Age", sed ni ne povis presigi pli, ĉar la Estraro nek aprobis nek malaprobis represon.

En kelkaj tre fundamentaj nuntempaj aferoj la Estrara ne-ago kondukis al tio, ke privatuloj transprenis la laboron. La penoj de unu homo en Novjorko, Bernard Stollman, akiris pli da publika atento al Esperanto dum la lasta jaro ol havigis ELNA eble dum sia tuta ekzisto, kaj aliaj privatuloj helpas ĉe publik-rilataj agadoj, kiujn ELNA preskaŭ plene neglektas. Du grandaj diskutoj okazas nun en ELNA. Unu temas pri la propono starigi oficejon en Novjorkurbo. Vigle oni negocas, pensas, kaj planas pri tio, kaj en la mezo de

ESPERANTO GROUPS _____ in the _____ U. S. A.

Listed by State, City, and name of person to be contacted for further information:

California:

- Hillsborough: Peninsula Esperanto League (Mrs. William Schulze, 410 Darrell Road).
Los Angeles: Esperanto-Klubo de Los Angeles (Wm. W. Glenny, 2705 Carlaris Road, San Marino).
Napa: Napa Esperanto Club (Mrs. D. C. Walker, 2846 Monticello Road).
Palo Alto: Esperanto in Palo Alto (P.O. Box 11564, Station A).
Sacramento: Esperanto Society of Sacramento (J. Q. Rickey, 2667 17th St., Sacramento 18.)
San Diego: Esperanto Society of San Diego (Frances E. Helmut, 5615 Beaumont Avenue, La Jolla (San Diego)).
San Francisco: Esperanto-Societo de San Francisco (SSgt. Barbara D. Colt, 580C Lendrum Road, Presidio of San Francisco).
San Gabriel Valley: Blind Study Group (Mrs. Phillips Neuman, 2736 Cogswell Road, El Monte).
Santa Monica: (Mrs. Blanche Parker, 515 25th Street.)

D.C.:

- Esperanto Club of Washington (Sergio Docal, 2947 Tilden St., N.W., Washington).

Illinois:

- Chicago: Esperanto Society of Chicago (Mrs. J. N. Denison, 17958 Homewood Ave., Homewood).

Massachusetts:

- Cambridge: Harvard Esperanto Club (Quincy House, Box 8, Harvard University, Cambridge, 02138).
Springfield: Greater Springfield Esperanto Club (Warren H. Gould, 114 Deerfield Street, Greenfield).

Michigan:

- Ann Arbor: (Wm. C. Dickerman, 424 Hilldale).

Missouri:

- St. Louis: Esperanto Societo de St. Louis (John Sabin, 9 Princeton Place, University City 30).

Montana:

- Missoula: Esperanto Study Group (Bob Davis, 1721 Helen).

New York:

- New York: The Esperanto Society of Greater New York (50 Overlook Terrace, New York 33).
New York: Esperanto-Klubo de Novjorkurbo (Dr. Julius Balbin, 340 Riverside Drive, Penthouse 2, New York 25).
New York: Esperanto Study Group (Frances Leshner, 4 West 28th Street, New York 1).
New York: Staten Island Esperanto-Pondo (John Kallenta, 83 Kenball Ave., Staten Island 14.)
Esperanto Education Center, P.O. Box 406, Looper Station, New York, N.Y. 10003.

Oregon:

- Corvallis: Oregon State University Esperanto Group (Jean Ann Trout, 507 West Hall, OSU).
Medford: Rog-vala Esperanto-Ligo (Sino Bettie L. Buonocore, 109 South Oakdale).
Oregon City: Oregon City Esperanto Group (Mrs. Lawrence Winkleman, 4203 S.E. Rothe Road, Milwaukie 22).
Portland: Esperanto-Societo de Portland (ESPO). (Mrs. Evelyn Deer, 12946 N.E. Hancock St., Portland 30).
Portland: Multnomah Esperanto - Stud - Grupo (Tomaso Davidson, 3434 S.W. Marigold St., Portland 19).

Pennsylvania:

- Allentown-Bethlehem: Esperanto Club of the Lehigh Valley (Donald Munro, 1961 Erie Ave., Quakertown).
Meadville: Meadville Esperanto Society (Barbara Eberhardt, 681 Hickory St.).
Pittsburgh: Esperanto-Klubo de Pitsburgo (Donald H. McClellan, 333 Macassar Drive, Pittsburgh 36. Phone: (412) 655-7704).
Tri-State Esperanto-Infirmejo and Tri-State Esperanto-Bulteno (2736 Locust Drive, Bridgeville).

Texas:

- Houston: Esperanto-Klubo de Houston (Edward F. Lacy III, 6923 Schley St., Houston 17. Telefono: WA-6-5702).

Washington:

- Seattle: (Vincent Griffith, 8556 37th Ave., S.W.).
Spokane: (H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave.).
Tacoma: (Ruth Culberg, 1912 N. Monroe).
Walla Walla: Montvida Esperanto Society (Al Estling, 1351 Grant St.).

National Groups:

- Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.
Junularo Esperantista de Nord-Ameriko (JEN) (Richard P. Kollin, Apt. 4a, 30 Avenue B, New York, N.Y. 10009).

Book Dealers:

- Esperanto League Book Service, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.
Shorey Book Store, 815 Third Ave., Seattle 4, Washington.
Esperanta Libroservo, 6361 Elmburst Rd., San Diego 20, California.
All the book dealers accept mail orders.

junio okazos en Novjorko konferenco pri la afero. Sed la Estraro, kiu devis komenci kaj gvidi tian gravaĵon, ludis nenian rolon, kaj verŝajne la junia konferenco ellaboros planon kaj prezentos ĝin al la julia Kongreso tute preter la Estraro. La dua granda debato temas pri la oficiala organo de ELNA, la Nordamerika Esperanto-Revuo. Multaj aktivaj membroj de ELNA decidis ke la Revuo estas eraro. Pro diversaj kialoj, ili opinias ke ELNA ĉesu eldoni la Revuon, kaj eldonu pli malmultkoston novaĵbultenon, plus eble maloftajn informlibretojn en gazeta formato. (Legu ankaŭ "Kio Mankas en la Esperanto-Gazetaro?", en ĉi tiu gazeto.) Aliaj defendas la Revuon, kaj inter la diversaj flankoj la debato viglas. Sed ĉu la Estraro, kiu devas gvidi la Revuon, faras ion en tiu debato? Ne, la Estraro kvazaŭ eĉ ne aperis ĉe la debatejo. Eble okazos ankaŭ ia privatula konferenco pri la Revuo, samkiel pri la oficejo, ĉar nenio fariĝos se privatuloj ne faros ĝin.

La situacio estas jene: neniu rajtas regi ELNA krom la Estraro; la Estraro ne agas; do ELNA estas paralizita. Sian grandan potencialon ĝi ne povas realigi, kaj do la nombro da membroj, la kvanto da disponata mono, la grado de publika intereso, kaj--la kerna celo--la nombro da Esperantistoj restas senkreskaj. Interne de tiu situacio estas klara unu emo: iom post iom, kiam oni konstatas la netolereblecon de la paralizo, privatuloj neoficiale sed efektive transprenadas la taskojn apartenajn al la Estraro. Teorie ELNA estas demokratio; fakte ĝi estas anarkio; se la nuna ŝanĝado daŭros, ELNA fariĝos aktivulokratio, kaj ni senhezite esprimas mian preferon al tiu lasta regmaniero super anarkio.

Do, ni konstatis la situacion, ni trovis la emon. Kio devas esti farita? Kvankam la aktivuloj privataj komencis transpreni partojn de la Estrara laboro, tamen la plej aktivaj personoj en la Ligo--la ĉefaj postenuloj--ĝis nun tro modestas por fari decidojn laŭregule Estrare farendajn. Kaj tial la paralizo grandparte daŭras, kaj daŭros plu, ĝis la Estraro oficiale transdonos al la ĉefaj postenuloj la plejmulton de la potencoj nun posedataj de la Estraro. TIAL, LA NEPRA, URĜA, EVIDENTA UNUA PAŜO AL LA REVIVIGO DE ELNA ESTAS: KE LA ESTRARO OFICIALE TRANSDONU AL KOMITATO KONSISTANTA EL LA PREZIDANTO, LA VIC-PREZIDANTO, LA SEKRETARIO KAJ LA KASISTO LA PLENAN RAJTON REGI LA LIGON LAU SIA BONTROVO. LA ESTRARO RAJTU POSTULI AŬ MALPERMESI UNUOPAJN AGOJN, ELSPEZOJN, ktp., SED LA REGA KOMITATO RAJTU SUPOZI LA KONSENTON DE LA ESTRARO ĜIS ĜI ESPRIMOS MALKONSENTON. TIEL, NEAGO DE LA ESTRARO NE MALEBLIGU AGON DE LA KOMITATO.

La Estraro devas agnoski la fakton ke ĝi grandskale fuŝis la Ligon, kaj ke ĝi ne kompetentas regi, sed nur "kontroli". Se la

Estraro rajtis havi la nunan Regularon dum la lastaj 11 jaroj, ĝi eĉ pli rajtas redoni al la postenuloj la potencojn kiujn ĝi prenis, kaj reiri al tiu pozicio al kiu la Statuto originale destinis ĝin. Ĉu estas danĝeroj en tiu propono? Nur apenaŭ eblaj danĝeretoj. Ĉar la supre nomitaj postenuloj jam montris sin kompetentaj, prudentaj, komunikemaj, kaj tre laboremaj. Sed estas grandegaj nepraj danĝeroj en la nuna situacio, ĉar, se la paralizo daŭros, la privatulaj agadoj preterpasos la oficialajn de ELNA, kaj la Ligo, fariĝinte senutila superfluaĵo, povos tutsimple finmorti. Memoru: la elekto estas inter aktivulokratio kaj anarkio. Efektive ĝi signifas elekton ĉu ELNA estos forta aŭ malforta, vigla aŭ laca, sukcesema aŭ neprogresema, viva aŭ morta. La Estraro kapablas fari tiun decidon, per abdiki la tronon kiun ĝi ne kompetentas okupi. Kaj se la Estraro ne agos, mi antaŭvidas ke la Novjorka Kongreso en julio rerigardos al paragrafo 603 de la Statuto: "La Kongreso havu plenan aŭtoritaton pri ĉiuj aferoj de la Ligo, krom ŝanĝoj al la Statuto kaj la elekto de postenuloj." Mi antaŭvidas ke la Kongreso oficiale kondamnos la Estraron per la plej severaj vortoj, nuligos la Estraran Regularon, kaj reorganizos la Ligon por meti la potencon en la manojn de tiuj kiuj montris sin kompetentaj ekzerci ĝin.

REZULTO DE LA KONKURSO

Ni ĝojas anonci ke 16 personoj partoprenis la konkurson en la lasta numero de la JEN-Bulteno. Per lotumo oni elektis unu el la partoprenantoj por ricevi premion. La nomo de la feliĉa venkinto estas

ARTHUR MORSE

el Millers Falls, Massachusetts. Li ricevos kiel premion la librojn Koloroj, de Julio Baghy, kaj Oriento kaj Okcidento: Al Reciproka Kompreno?, de Georges Fradier.

Eĉ la nevenkintoj ankaŭ gajnis grandan premion: ankoraŭan jaron de la divers-enhava, sprita, pensiga kaj distra JEN-Bulteno kontraŭ nur unu eta dolaro. Ĉu vi ankoraŭ ne renovigis vian membrecon aŭ abonon? Se ne, faru jam hodiaŭ! Simple sendu dolaron al la Kasisto: Stanley Cohen, 16 Long Avenue, Allston, Massachusetts 02134.

Bernd Kreykenbohm

"Junularo kaj Amasinformiloj"

"Kiel povas akordiĝi la fundamenta rajto je persona esprimlibereco, garantiata al ĉiu en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kaj la rajto de infano je protekto kontraŭ la danĝeraj influoj de la amasinformiloj?"

"Tio ĉi estis la centra demando en seminario pri la rajtoj de infanoj, okazigita en Varsovio de Unuiĝintaj Nacioj en kunlaboro kun la pola registaro. Evidente la problemo havas tiom da flankoj kaj tiom da akompanantaj fenomenoj vidataj kaj prijuĝataj alie en ĉiu lando, ke oni ne sukcesis trovi ĝenerale kontentigan respondon al la demando. Sed la seminario donis okazon al 44 partoprenintoj el 23 eŭropaj ŝtatoj kaj al observantoj de multnombraj neŝtataj organizaĵoj, informi sin pri la internŝtataj politiko kaj praktiko sur tiu tereno, kiuj etendiĝas de absoluta kontrolado ĝis plena necenzurado. Kiel rezultato de ilia dusemajna opini-interŝanĝo la partoprenintoj de la seminario konsentiĝis al ĝenerala raporto pri la situacio, en kiu elirpunktoj al kompromiso kaj samopiniado estas klare ekkoneblaj.

"UNESKO estis kontribuinta ampleksan laborfundamentan akton, al kiu oni ĉiam denove revenis dum la diskutoj. La UNESKO-dokumentoj neniel neas la rajton de la unuopaj ŝtatoj, en la intereso de la junuloj uzi kontrolon aŭ limigon en maniero dezirinda en la respektiva momento, atentigas tamen emfaze pri la 'pozitivaj disonoj', kiuj, se oni antaŭplanas por pli longa tempo, eble estos pli efikaj. Al ili UNESKO kalkulas ekzemple la 'pertelevidadan edukadon', per kiu juĝkapablo kaj kritikemo povas disvolviĝi ĉe la junularo. Ĝi plie rekomendas eldoni junularkonformajn skribaĵojn en pligrandigitaj eldonkvantoj, senĉese plibonigi ties kvaliton kaj zorgi pri internacia disvastigo. Ankaŭ stimulado de planoj esplori la efikon de la amasinformiloj oni konsideras urĝa.

"En la fina raporto de la seminario esprimiĝas la espero, ke la klopodoj de UNESKO sur tiu tereno estonte estu subtenataj de la membroŝtatoj ankoraŭ pli forte ol ĝis nun."

La supra artikolo, aperigita la 18-1-1964 en nordgermana ĵurnalo, je la unua rigardo ŝajnas neniel rilati al la problemoj, kiujn ni esperantistoj klopodas solvi. Sed tiu unua impresado trompas. Estas

ja bone informi la publikon pri tio, ke Esperanto-movado ekzistas kaj ke ĝi estas kapabla trakti kaj solvi demandojn kaj problemojn de internacia intereso, multe pli bone estas tamen demonstracii tion en la praktiko, kaj al tio la artikolo donas instigon. La plej grandan intereson laŭ mia opinio meritas ne la seminario en Varsovio mem, sed la rekomendoj kompilitaj de UNESKO okaze de la seminario, ĉar ĉi tie prezentigas ebleco efektiviĝi proponon de tiu organizaĵo, kun kiu ni kunlaboru, kie ni povas.

Mi ne scias, kiajn imagojn la kompetentaj komisionoj de UNESKO havas, rekomendante "eldoni junular-konformajn skribaĵojn en pligrandigitaj eldonkvantoj, ...kaj zorgi pri internacia disvastigo". La internacia disvastigo de junulargazetoj ne estus ebla sen uzi la helpon de tradukoficejoj, metodo treege multekosta kaj temporaba. Temus ja ne nur pri tradukado de la kontribuaĵoj, kiujn oni volas aperigi, de la nacia lingvo de la redaktoro en la lingvojn, en kiuj la gazeto eldoniĝas. Por vekti la intereson de la junularo en tiel multaj diversaj landoj, oni devus prezenti artikolojn verkitajn de kunlaborantoj en tiuj landoj kaj leterojn skribitajn de la legantoj, kaj la senĉesa tradukado tien kaj reen kaŭzus tiom da tempoperdo kaj miskompreno, ke la afero simple ne povus funkcii. Sed eĉ se oni venkus tiujn obstaklojn, sukcesus trovi la necesajn financajn rimedojn kaj starigi stabon de kunlaborantoj en la diversaj landoj, la regula aperado de ĝenerale interesanta junulara gazeto ankoraŭ tute ne estus certigita. Por ke la gazeto fariĝu harmonia tuto necesus daŭra kontakto inter la redaktoroj en la unuopaj landoj kaj la ĉefredaktoro. Tiu rekta kontakto pro la malfacilaĵoj kompreni unu la alian certe ne estus ebla, almenaŭ ne tiel, kiel estus necese por bona kunlaboro. Pro tio mi kredas, ke internacia gazeto bazita sur tiu sistemo ne povus longe funkcii.

Post tiu teoria pripensado jen mia praktika propono: Pro kio ni esperantistoj ne kaptas tiun ŝancon? Ĉu ne estus eble eldoni tian internacian junulargazeton en Esperanto, regule traduki ĝin en la diversajn naciajn lingvojn kaj prezenti ĝin al la neesperantista junularo? Eĉ ne necesus fondi novan gazeton: ni jam havas unu, kiu taŭgas: Kontakto! Certe eblus aranĝi parton de tiu gazeto tiel, ke sen grandaj ŝanĝoj oni povas traduki ĝin en la naciajn lingvojn. Mi ankaŭ estas certa, ke en multaj landoj ni povos trovi kunlaborantojn, kiuj estas pretaj transpreni tiun taskon. En kelkaj landoj ni eĉ jam havas grupojn de legantoj por la gazeto, ĉar kelkaj el la landaj sekcioj de TEJO havas Informan Fakon, kiu regule eldonas nacilingvan informilon kaj sendas ĝin al junulargrupoj neesperantistaj kaj al

interesiĝantaj unuopuloj. Pliriĉigo de tiuj informiloj per interesaj internaciaj kontribuajtoj certe ne povus malhelpi ilin. En la aliaj landoj oni povus klopodi fari kontrakton kun jam ekzistanta nacilingva junulargazeto aŭ eble mem multoblige kaj forsendi tradukitajn artikolojn.

Mi volonte konfesas, ke mi mem ankoraŭ ne sukcesis ĝisfine trapensi mian proponon. Mi ne povas prezenti kompletan projekton pri la organizado de tia gazeto; por tio mankas al mi la necesaj scioj kaj spertoj. Sed mi kredas, ke oni pridiskutu la aferon, ĉar tie ni havus okazon unuflanke pruvi, ke ni estas pretaj kaj kapablaj efike subteni la laboron de UNESKO, kaj aliflanke varbi por Esperanto prenante la nerektan sed miaopinie ne malpli efikan vojon, ĉar esperantlingva gazeto, kiu regule tradukiĝas en multajn naciajn lingvojn, certe estus bona pruvo de la taŭgeco de nia lingvo.

Mi ankoraŭfoje devas reveni al la supra ĵurnala artikolo, ĉar ĝi enhavas ankoraŭ alian instigon, kiun mi tamen volas pritrakti iom malpli detale. "Ankaŭ stimulado de planoj esplori la efikon de la amasinformiloj oni konsideras urĝa", oni skribis. Ĉu tiu demando ne estus taŭga temo por oratoraj konkursoj?



KIO MANKAS EN NIAJ CELOJ

David Adamson

La celo de ĉi tiu numero, "Kio Mankas en la Esperanto-Movado", bone, se neintence, esprimas mankon en niaj celoj. Estas tro da movadismo en la movado.

En Esperantujo ne estas vera loko por homoj kiuj nur deziras paroli kaj uzi la lingvon, nek por tiuj kiuj konsideras Esperanton nur ilo por komunikado. Se oni daŭre insistas ke oni nur uzos la lingvon, ne propagandos ĝin, oni estas malbone pripensita de la movadistuloj. Kiam oni lernas la lingvon, oni estas tuj kaj daŭre varbita por ĉiaj taskoj. Pro tio, homo kiu ne ŝatas doni sin al celoj povas decidi ke estas preferinde esti tute for de Esperanto, anstataŭ teni ĝin por okazoj en kiuj ĝi estas utila.

Alia malhelpa rezulto de tiu movadismo estas ke homo kiu ne kore interesiĝas pri la movado povas, pro malintereso, fuŝi taskojn kiujn oni donas al li.

Ofte personoj, al kiuj ni parolas pri la avantaĝoj de Esperanto, demandas nin pri la ekzisto de faka literaturo en la Internacia Lingvo: libroj, revuoj, terminaroj k.s. Tiam ni komencas respondi ne certe kaj per ĝeneralaj frazoj.

Vere, la faka literaturo en Esperanto estas ankoraŭ en embria stadio. La aperantaj fakrevuoj estas malpli ol dek, kaj ilia paĝamplekso estas tre modesta, eĉ mi povas diri mizera. Ni esperantistoj revas pri la tago, kiam oni komencos apliki nian lingvon en ĉiuj internaciaj rilatoj. Sed tiu tempo venos ne per eldono de dekreto de iu. Ni devas obstine labori, por ke la homaro, la diversaj popoltavoloj kaj fakaj medioj ne nur rekonu la utilecon de Esperanto, sed ankaŭ lernu kaj apliku ĝin.

La rezultoj estos dekoble pli grandaj, se ni en ĉiuj landoj samtempe direktos nian Esperanto-propagandon al difinitaj medioj. Kiamaniere oni povas efektiviĝi tion? UEA devas esplori, kiuj medioj plej suferas pro la lingva diverseco en iliaj internaciaj rilatoj. Ĝi devas ellabori du-tri jaran planon por agado. Oni verku konvenajn propagandilojn, kiujn la landaj organizaĵoj devas traduki nacilingven. La propagando de Esperanto en la difinita medio en ĉiu lando devas esti gvidata de la landa esperantista organizaĵo kaj efektivigata de la lokaj Esperanto-societoj. Se ni sukcesos en dek-dekkvin landoj organizi po dek Esperanto-kursoj por ĵurnalistoj, arkitektoj, inĝenieroj, kuracistoj aŭ sportistoj, post kelkaj jaroj en ĉiu lando ni havos konsiderindan nombron da esperantistoj el tiu medio. Unue ili postulos, ke iliaj fakrevuoj aperigu resumojn en Esperanto kaj poste iom post iom oni komencos la eldonadon de faka literaturo en Esperanto. Sekvos internaciaj renkontiĝoj, seminarioj kaj kongresoj, en kiuj la ĉefa lingvo estos Esperanto.

La efektiviĝo de la Zamenhofa kaj la Junulara Jaroj pruvis, ke se oni klare montras la celon kaj la rimedojn, per kiuj oni povas ĝin atingi, la esperantistoj faras multon por certigi la sukceson. Kiu antaŭ unu jaro povis aserti, ke dank' al la unujara porjunulara agado ni havos konsiderindajn rezultojn: amasa kongreso, aperigo de internacia revuo, fondo de kelkaj landaj sekcioj, organizo de pluraj junularaj kursoj en multaj landoj ktp.

Antaŭ pli ol jaro la japanaj esperantistoj, en ligo kun la Olimpikoj, kiuj okazos post du jaroj en Japanio, eldonis presitan alvokon al ĉiuj esperantistoj, instigante ilin organizi kursojn por

sportistoj, kiuj partoprenos la ludojn. En ĉiuj landoj oni konas la nomojn de la plej elstaraj sportistoj. El tiuj personoj oni formas la teamojn, kiuj konkuros dum la Olimpikoj en Japanio. Tamen mi dubas, ĉu eĉ unu landa Esperanto-organizaĵo, societo aŭ aparta esperantisto interesiĝis pri la adresoj de tiuj sportistoj, sendis al ili informojn pri Esperanto aŭ invitolon por partopreni Esperanto-kurson. La alvoko de la japanaj esperantistoj estis bona kaj siatempa, tamen sen plana kunordigita laboro gvidata de unu centro. Ankoraŭ ne estas malfrue efektiviĝi la alvokon. Eble UEA organizos la kampanjon. Se ni estas persistaj, obstinaj kaj se ni agos taktike, la rezultoj estos bonaj.

(el Bulgario, februaro 1964)

(daŭrigo de EN LA LANDO DE LA BLINDULOJ UNUOKULULO REĜAS de paĝo 31)

kutime kapablas sin organizi "neoficiale", kaj ĉiukaze temas pri unu forĵetebla ero en troŝargita programo. Por la teatra vespero oni aldonu en la kongresa libro resumon de la koncerna teatraĵo: kutime granda parto de la aŭskultantaro plene malsukcesas sekvi ĝin.

-- Fine, oni minimumigu flagflirtigon, malgrandigu (aŭ forigu) kongresajn insignojn, evitu stultajn Esperantajn kantojn, kaj ĉion fari por bone kaj afable trakti la kongresanaron per adekvata akcepto kaj organiza servoj. (Ĉiukaze, mi ĉiam forgesas la duan strofon de tiu diabla Himno...)

Mi parolis ĉi-artikole simple pri kelkaj malsanoj kaj unu propono pri plibonigo. La titolo de la artikolo - "En Lando de la Blinduloj, Unuokululo Reĝas" verŝajne ne bezonas klarigon: eĉ minimuma sagaco en la Esperanto-movado faras el la koncerna homo eminentulon. Sciante tion, multaj esperantistoj allogiĝis al Esperanto precize ĉar temas pri malgranda fermita rondo kie ili povas eminenti per tute malgranda peno. Kaj aliaj, la veraj idiotoj de la ekstera mondo, allogiĝis al Esperanto ĉar estas pli granda ebleco en frata rondo de geamikoj kaŝi de aliaj (kaj sekve de si mem) la propran sentaŭgecon. Ŝafo senpene kapablas solidari kun siaj samspecanoj - sed ni bezonas ne ŝafojn sed ordinarajn, raciajn, nefratecajn HOMOJN!

**

**

**

**

**

**

**

**

La valoro de la internacia lingvo pruviĝas en ĝia praktika uzeblo. Indas ĝin lerni nur se per ĝi ni povas pliriĉigi nian scion, kontakti la homojn, kiuj restus ekster nia atingopovo pro unu aŭ alia baro, nur se ni povas pere de ĝi informiĝi pri la aferoj, pri kiuj la kono de la gepatra, aŭ eĉ unu-du kromaj lingvoj ne povas kontentige helpi.

La nuna mondo estas riĉega je eventoj, je interesaĵoj. La gazetaro, la radiotelevida sistemo kaj aliaj informrimedoj ne sufiĉas por kontentigi nian scivolon. Ni serĉas pli senperajn fontojn de la informoj. Ĉu ni, esperantistoj, konscias ke tian fonton ni jam havas he la dispono? Ĝi estas la reto de la delegitoj kaj fakdelegitoj de UEA, eble ne ĉiam kompleta laŭ landoj kaj laŭ fakoj, sed nia komuna tasko estas kompletigi ĝin.

La Dua Baza Laborprogramo de UEA (III-A-5-j) starigis antaŭ la Asocion la taskon duoblige la nombron de delegitoj kaj fakdelegitoj. Similan taskon envicigis TEJO kiel la junulara sekcio de UEA en sian Bazan Perspektivan Laborprogramon (III-A-5-f en Informfolio n-ro 4, aprilo 1964, p. 3), kiu tekstas: "...(f) pligrandigi la nombron de la Junularaj Delegitoj de UEA tiel, ke estu ili almenaŭ tie, kie ekzistas Junulara Grupo."

En Usono estas nur sep junularaj delegitoj, en Cambridge, Mass.; Lawrence, Kan.; Meadville, Penna.; Pasadena kaj Los Angeles, Calif.; Willmore, Ky.; kaj New York, N.Y. Certe ĉiuj konsentos ke por tioma lando ili ne sufiĉas. Do, estas eblo por ĉiu juna esperantisto fariĝi junulara delegito en sia loko. Necesas nur peti Delegit-Respondilon de la ĉefdelegito de UEA en Usono, s-ro D.E. Parrish, 328 West 46th Street, Los Angeles, California 90037. La kondiĉojn kaj instrukciojn oni povas legi en la Jarlibro de UEA, unua parto, 1963, p. 168.

Fariĝante junulara delegito, ĉiu el ni helpos plenumi la laborplanojn de TEJO kaj de UEA, ĉiu el ni helpos informi pri la junularaj vivo, okazaĵoj kaj interesaĵoj en sia lando kaj per tio certe ankaŭ al interkompreniĝo de la junularo diverslanda.

Ŝakistoj: La Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (EŜLI) refondis sian bultenon (Esperanta Ŝako) kaj gvidas korespond-turnirojn. Informiĝu pri membreco ĉe la Sekretario: D-ro V. Faigl, ZLONICE (Okr. Kladno), Ĉeĥoslovakio.

venu nepre al...

N	N	000	V	V	JJJ	000	RRR	K	K	000	
NN	N	00	V	V	J	00	R	R	KK	00	
N	NN	00	V	V	J	00	RRR	KKK	00		
N	N	000	V		JJ	000	R	R	K	K	000

kaj ĝuu la plej grandskalan, plej luksan, plej eventoplenan, plej interesan Kongreson en la historio de ELNA!!! Simple rigardu al la programo, kaj vi ne plu dubos ke vi devas ĉeesti tiun unikan renkontiĝon de la tutlanda esperantistaro.

Kongresejo: Hotelo Statler-Hilton, en la mezo de Novjorkurbo.

Merkrede, 1 julio: neformala komenco, vespere.

Ĵaŭde, 2 julio: registriĝo, oficiala komenco, aferkunsido, kaj montro de "ANGOROJ", la unua filmo originale farita en Esperanto.

Vendrede, 3 julio: aferkunsido, raportoj, speciala konferenco pri la lingvoproblemo de Afriko (kun d-ro Mario Pei kaj aliaj fakuloj), kaj reĝstila bankedo de sep eroj, kun drametoj prezentitaj de JEN.

Sabate, 4 julio: aŭtobusa gvidata ekskurso tra la urbo New York kun ĉiuj gravaj vidindaĵoj, vizito al la grandioza Mond-Foiro, kaj speciala libera vespero por ebligi al vi ĝui vian elektaĵon el la centoj da muzikaj, dramaj, edukaj, kaj aliaj prezentaĵoj kaj distraĵoj de Novjorko.

Dimanĉe, 5 julio: finaj rezolucioj, raportoj, kaj oficiala fermo.

Hotelĉambroj estas preskaŭ elĉerpitaj!! Sendu vian kongreskotizon (\$14.50 por plenaĝuloj kaj \$10 por personoj kun malpli ol 16 jaroj) tuj al:

Ralph A. Bonesper
 Apartment "A"
 579 Ft. Washington Avenue
 New York, New York 10033

kaj petu plenan informon pri la Kongreso kaj pri rezervado de ĉambroj se vi ankoraŭ ne ricevis tiun informon. Ĉekoj estu pageblaj al: "12a Esperanto-Kongreso de ELNA".

Ne prokrastu, sed jam nun planu por vigla, amuza, memorinda duon-semajno, 1-5 julio!


GRAVA KOMUNIKO DE TEJO

Por instigi la plej vastan partoprenon en la laboro de TEJO de esperantistoj kaj junaj kaj plenaĝaj, TEJO okazigas dum 1964 tutmondan varbkonkurson. Ĉiuj el 14 landaj sekcioj de TEJO konkurencas unu kontraŭ la aliaj, por kiel eble plej multe superi siajn kvotojn de membroj plus abonantoj. Sed ne necesas ke JEN estu la plej sukcesa por ke ni gajnu premion: se la nombro da membroj plus abonantoj en Nord-Ameriko en 1964 superos nian kvoton, JEN ricevos kiel premion 1,50 guldenojn por ĉiu superkvota membro aŭ abonanto!

Kio estas la kvoto de JEN? Nur 100, kaj ni jam pli ol duone atingis tiun celon!

Kio estas enkalkulata en la konkurso? a. Abonoj al Kontakto (8 guldenoj jare); b. Junaj Membro-Abonoj en UEA (15 gld. jare); c. Membro-Abonoj kun Kontakto en UEA (20 gld. jare). Ĉiuj kotizoj devas esti ricevitaj en 1964 kaj destinitaj al membrecoj aŭ abonoj por 1964.

Kion fari? Pensu unue pri vi: ĉu vi apartenas al unu el la ĵus-menciitaj kategorioj a., b., aŭ c.? Se ne, tuj abonu aŭ membriĝu! Sekve, ekprilaboru viajn amikojn, malamikojn, konatojn & nekonatojn esperantistajn, ĉu maljunajn, junajn, ĵusnaskitajn, aŭ baldaŭ naskotajn. Kial JEN ne nur superu, sed eĉ duoblu sian kvoton? Per via helpo, tio ja eblas. Ek al varbado!



Bildo de la oldularo, kiel kelkfoje ŝajnas al la oldularo ke ili aspektas al JEN. --Margaret Barkley

ENHAVO

Enkonduko.....	1
Kio Mankas al ELNA?: Armin Doneis.....	3
Nia Konferenco en Cambridge: Allan Fineberg.....	4
Oficiala Anonco.....	9
Kio Mankas en JEN?: Margaret Barkley.....	11
Pri la Nombro de Esperantistoj: Dovra Soleo.....	12
Kio Mankas en Instruado de Esperanto: Catherine Schulze.....	15
Kio Mankas en UEA: Richard Kollin.....	17
En la Lando de la Blinduloj Unuokululo Reĝas: Humphrey Tonkin.....	18
Ĉu Vi Povas Respondi al Ĉi Tiuj?: Gian-Carlo Fighiera.....	22
La Lingva Kaoso, aŭ Kio <u>Ne</u> Mankas: Mandragoro.....	26
Desiras Korespondi.....	32
Kio Mankas en la Esperanto-Gazetaro?: Roman Dobrzynski.....	34
Kio Mankas en ELNA?: Jonathan Pool.....	35
Esperanto-Grupoj en Stat-Unio.....	37
Rezulto de la Konkurso.....	40
Kio Mankas en la Esperanta Junular-Gazetaro?: Bernd Kreykenbohm.....	42
Kio Mankas en Niaj Ŝeloj: David Adamson.....	43
Kio Mankas en Esperanto-Propagandado?: Nikola Nikolov.....	45
Ĉu Vi Jam Estas Junulara Delegito?: Ivo Osibov.....	46
Venu Nepre al Novjorko.....	48
Grava Komunikado de TEJO.....	49
	50

PRI NIAJ KONTRIBUINTOJ. Armin Doneis estas membro de la Membreca kaj Organiza Komitato, eks-Prezidanto, kaj eks-Estrarestro de ELNA. Allan Fineberg estas Redaktoro de la JEN-Bulteno. Margaret Barkley estas gvidanto de loka Esperanto-grupo. Catherine Schulze estas Kun-Estro de la Eduka Komitato de ELNA, Esperanto-instruisto en publika plenaĝula lernejo, kaj gvidanto de regiona Esperanto-organizo. Richard Kollin estas Estrarano de JEN kaj de EEC. Humphrey Tonkin estas Estrarano de TEJO kaj de JEN, Redaktoro de Kontakto, kaj eksa Estrarano de JEB. Roman Dobrzynski estas Komitatano de TEJO kaj eks-Prezidanto de PEJ. Li magistrigis pri la ĵurnalismo per disertacio pri la Esperanto-gazetaro. Jonathan Pool estas Estrarano de ELNA, de JEN, kaj de EEC. David Adamson estas Estrarano de la Esperanto-Klubo de Harvard-Radcliffe. Ivo Osibov estas Estrarano de TEJO kaj Redaktoro de "La Juna Vivo".